



5/6\*1993\*158

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



## Nové opatření v činnosti svazu

Stalo se pravidlem - a naši členové to dobře vědí - že poslední číslo každého ročníku našeho svazového orgánu Starto obsahuje více příspěvků v češtině, zatímco v ostatních číslech jsou všechny články a informace publikovány pouze v esperantu. Tato zvyklost je určitou skromnou formou uznání přispívajícím členům a příznivcům svazu, kteří esperanto podporují, i když sami z různých důvodů neměli dosud dostatek času k jeho ovládnutí. Redakce Starta jim tak umožňuje, aby byli informováni o činnosti svazu a o rozvoji českého esperantského hnutí jak doma, tak i v zahraničí. I toto dnešní oslovení členů je úmyslně psáno česky, neboť by mělo být naprosto srozumitelné všem, kteří s naším svazem, jeho funkcionáři a pracovníky přicházejí do styku. A koneckonců obsahuje informace, které nejsou pro zahraničí zajímavé.

Snad se řada členů pozastaví nad faktem, že letošní ročník Starta uzavíráme dvojčíslem. Není to redakční rozmar, nýbrž skutečnost vynucená současnou situací našeho svazu, zejména situací finanční. Jí se zabývala dvě minulá zasedání výboru svazu, který musel přistoupit k některým úsporným opatřením, z nichž jedním je vydání tohoto dvojčísla.

O finanční napjatosti svazu byli členové informováni už několikrát a nemá smysl zde znovu rozebírat její příčiny, které jsou chronicky známy a obávám se, že se v dohledné době - pokud zůstane sídlo svazu na dosavadním místě - asi sotva podstatně změní. Nezbyvá tedy, než toto všeobecné konstatování doplnit o vysvětlení kroků, které výbor v zájmu dalšího fungování svazu učinil.

Občasní návštěvníci sekretariátu svazu v Jilské ulici v Praze již

zjistili, že v jedné z místností je nyní prodejna českého křišťálu, jež vznikla po vzájemné dohodě svazu se soukromým výrobcem skla. Věřím, že tato symbioza bude oboustranně výhodná a úspěšný prodej se příznivě projeví v rozpočtu svazu, což by zase mělo inspirovat naše členy k tomu, aby případně - zejména zahraniční - zájemce o tradiční český výrobek přiváděli právě sem.

Další závaznou skutečností, která se výrazně dotkne chodu celého svazu, je zrušení funkce vedoucího sekretariátu. Tuto placenou funkci doposud vykonával tajemník svazu ing. Zdeněk Pluhař a musím veřejně říci, že to dělal velmi kvalitně a vysoce odborně bez ohledu na pracovní dobu a osobní pohodlí. S jeho prací bylo vedení svazu - jak minulé, tak i současné - maximálně spokojeno. Musím ale naše členy s uzarděním informovat, že jsme se v posledních měsících dostali do tak tíživé situace, že jsme vedoucímu sekretariátu ani nemohli vyplatit mzdu, jejíž velkou část mu dosud dlužíme. Protože ani nadále nebudeme na ni mít dostatek prostředků, zrušil výbor tuto poslední placenou funkci ve svazu. Bohužel, postavili jsme tak našeho dobrého a spolehlivého pracovníka do role nezaměstnaného člověka. Jsme si vědomi, že je to velmi asociální, ale výbor k tomu donutila tvrdá realita. Z titulu funkce předsedy svazu bych chtěl zde ing. Z. Pluhařovi poděkovat za celou tu velkou a ne příliš vědnou práci, kterou pro svaz a esperanto vykonával jako profesionál, a věřím, že jako tajemník svazu, do kterého funkce byl řádně opět zvolen na společném sjezdu v Karlových Varech, bude pracovat stejně usilovně a úspěšně. Členové svazu si však musí uvědomit, že sekretariát již nebude jako dosud v provozu trvale, nýbrž jen ve vymeze-

ných úředních hodinách, které budou záviset na možnostech tajemníka v jeho příštím zaměstnání. To také samozřejmě povede ke zpomalení vyřizování všech svazových záležitostí a také k většímu zatížení ostatních vedoucích funkcionářů svazu. Bylo by proto vhodné, aby se členové se svými záležitostmi obraceli adresněji na jednotlivé členy výboru svazu podle jejich funkčních kompetencí, které již byly ve Startu uveřejněny.

Přesto, že tato opatření řeší současnou situaci svazu jen částečně, s dalšími úspornými kroky zatím neuvažujeme (např. s omezením počtu čísel Starta apod.). Bude záviset na příštím stavu členské základny svazu, na rychlosti úhrady členských příspěvků, na zájmu o písemné kurzy či na výsledcích dalších mezinárodních esperantských setkání v České republice, zda budeme schopni dále zajistit spolehlivé fungování svazu. Všichni si však musíme zvyknout, že svaz jsme my všichni, že práci za nás nevykoná pomyslný "placený štáb v Praze", ale jen ti nejobětavější členové, a to často na úkor svých rodin, zaměstnání a osobního času.

Zbývá otázka, jak můžete pomoci vy, členové svazu a čtenáři Starta. Předně řádným a včasným plněním svých členských povinností, dále propagací esperanta a získáváním nových členů svazu. Dále nezatežováním funkcionářů svazu záležitostmi podružnými, bezvýznamnými nebo takovými, které je možno vyřešit v místě vašeho působení. A ti nejobětavější členové svazu by mohli významně pomoci i finančně. Je to možné provést poskytnutím bezúročných půjček, která by byla svazu k dispozici po dobu dvou let. Díky prozíravému vedení svazu a pochopení několika desítek členů má svaz do budoucna zajištěn minimální příjem z části akcií vložených do

privatizovaných podniků, ty však zřejmě budou přinášet dividendy až v příštím nebo dalších letech. Vedení svazu věří, že z těchto příjmů bude moci případné půjčky vrátit. Členové, kteří by byli ochotni stát se věřiteli svazu, který půjčky zaručí svým majetkem, a na přechodnou dobu podat mu snad záchrannou ruku, nechť se spojí s tajemníkem k projednání celé této záležitosti.

Nepiší se mi tyto řádky příliš vesele, ale vy, členové a příznivci svazu a nositelé krásné myšlenky mezinárodního dorozumění "naším" společným jazykem máte právo, abyste byli pravdivě informováni o skutečném stavu naší společné věci.

V. Kočvara

RESUMO:

La prezidanto de Ĉeña Esperanto-Asocio klarigas al membroj de la asocio streĉan situacion, ĉefe en financoj, kiuj nun regas en la asocio. La komitato devis alpaŝi al necesaj realigoj, kiuj ebligas kaj samtempe garantias pluan funkcion de la asocio. Oni nun kunigas lastajn du numerojn de Starto por ŝpari eldonelspezojn. En parto de la asocia oficejo en Praha nun funkcias vendejo de tradicia bohemia kristalo kaj parto de ĝia profito eniros la asocian buĝeton. La plej grava paŝo al pli ŝpara mastrumado estas nuligo de funkcio de oficejestro, kiun ĝis nun plenumis profesie inĝ. Pluhař. Do ne plu la oficejo de ĈEA funkcias tuttage. Al samideano inĝ. Pluhař, kiu plu restas asocio sekretario (nepagita), la prezidanto esprimas la plej altan dankon por la farita laboro. Fine oni instigas membrojn al plua helpo kaj subteno de la asocio, ĉu per ĝustatempa kotizado kaj plenumo de ĉiuj membraj devoj, ĉu per propagando de Esperanto kaj gajnado de novaj membroj. La asocio eĉ bezonas seninterzajn pruntojn, al kiuj la prezidanto alvokas la membraron.

## ZA SPRÁVNOU VÝSLOVNOST ESPERANTA. HELPILO POR ĆEAŔOJ.

**Motto: "To, že vím o chybě, je už půl cesty k její nápravě."**

Esperanto prý nejlépe vyslovují Češi, Slováci a Jihoslované. Je to snad pravda proto, že se hláskový systém jejich jazyků do značné míry shoduje s hláskovým systémem esperanta. Shoda je značná, ne však úplná. Jestliže si uvědomíme rozdíl, můžeme si výslovnost zlepšit tak, že náš zahraniční partner při rozmluvě nepozná, který jazyk je náš mateřský.

České (a slovenské) učebnice esperanta podávají o výslovnosti vesměs jen základní údaje. Opírají se o skutečnost, že esperanto je co do mluvnice, skladby a pravopisu neskonale jednodušší než kterýkoliv jiný jazyk. Jednotlivé jazyky mají však vlastní fonetické systémy, svůj "repertoár hlásek", který není absolutně totožný ani ve velmi blízkých jazycích. Je tedy na místě, abychom na rozdíly češtiny a esperanta v tomto ohledu upozornili a doplnili tak naše učebnice. Stává se, že žák, často samouk, může do své esperantské výslovnosti vnášet návyky z mateřštiny a trvale si je osvojit. To může vadit při ústní komunikaci se zahraničními esperantisty, zvláště tehdy, jsou-li rozdíly ve výslovnosti i u našich partnerů. (I když je dorozumění nesporné, přece jen jistou část pozornosti musíme věnovat tomu, že partner to či ono vyslovuje jinak než my. To platí pro obě strany.) Osvojit si mezinárodně akceptovanou a dnes již ustálenou standardní výslovnost a převzít či imitovat jinou začátečnickou či jinak pochybenou výslovnost jiného jazyka, jako např. "khaj", "khiu", "khio" apod., to jsou dvě různé věci.

Tolik na úvod. Teď si jen uvědomme, co se děje s našimi mluvídly, když mluvíme (vyslovujeme, artikuluje), přidejme k tomu pevnou vůli a jsme na nejlepší cestě k náležitě esperantské výslovnosti:

### Samohlásky

Dr. Zamenhof byl natolik prozíravý, že do hláskového systému mezinárodního jazyka vybral právě jen pět základních samohlásek - a, e, i, o, u. Případná otevřenější či zavřenější výslovnost u "e" či "o" totiž pak tolik nevádí. Budeme-li je vyslovovat tak, jak je ve spisovné češtině zvykem, je vše v pořádku. Pozor jen na tyto případy:

1. Krátké "i" musí být stejně zavřené jako dlouhé "i". Pozor tedy, aby se neblížilo vedlejší hlásce, "e". (To platí zejména pro Pražany.)
2. Hláská "e" nesmí být ani příliš otevřená, ani příliš uzavřená.
3. Hláská "u" je zaokrouhlená, rty tvoří kroužek. Nesmí znít neutrálně, bez zaokrouhlených rtů.

### Přízvuk a délka slabiky

Přízvukná slabika je dlouhá, přesněji řečeno: o něco delší než slabika nepřízvukná. "Dlouhá" však může být dvojím způsobem: přirozeně nebo polohou. Přirozeně dlouhá je slabika, které říkáme "otevřená" (končí na samohlásku), jako např. fi-no, ra-pi-da, la-ca, sa-ĝa, pe-re-i, ku-i-ri, kun-i-ri, he-ro-o apod. Dlouze vyslovujeme i citoslovce pod přízvukem: ho, ve! Teď však pozor, přijde výjimka. U zájmen, číslovek, předložek a korelativ se - i v přízvukné slabice - ustálila výslovnost krátká. Říkáme tedy: mia (ne "mía"), ili (ne "íli"), ilia, oni, unu, dua, deka, apud, super, kiu, tio, iam, ĉie, neniam atd. Podobně se již téměř všeobecně vyslovuje krátce přízvukné "i" v dvouslabičných slovech jako "fia", "pia", "krio", "strio" apod. Zdá se, že přízvukné krátké "i" vniká i do slov víceslabičných: Germanio, historio, arkeologio apod.

Slabika dlouhá polohou je slabika "zavřená" (následuje za ní více než jedna souhláska, příp. "j" nebo dvouhláskové "ů"), a samohláska, která ji tvoří, je vždy krátká, např. ar-to, par-to, las-ta, gran-da, ven-di, paj-lo, soj-lo, aŭ-di.

Zdánlivou výjimku tvoří slabika s následnou afrikátou (polosykavkou) "dz". Je to však jen grafická podoba znělého protějšku neznělé afrikáty "c". Hláska se píše dvěma písmeny. Proto dlouhé "e" ve slově "edzo" je v pořádku.

Jestliže druhá ze souhlásek za přízvučnou slabikou je likvida ("l", "r"), není délka samohlásky mezinárodně jednotná.

Můžeme tedy vyslovovat dlouze (pa-tro) nebo krátce (pat-ro), sa-blo nebo sab-lo. U dvouslabičných slov - jak se zdá - převažuje výslovnost dlouhá, u víceslabičných a u skupiny -ibr-, -ipr-, -idr-, -itr- krátká.

### **Souhlásky**

I když se většina souhlásek kryje se souhláskami v češtině, nebude na škodu, když upozorníme na odchylky. Ty jsou jen u dvou souhlásek, "h" a "v".

Esperantské "h" není znělé jako v češtině (slovenštině, ukrajinštině), ale neznělé, tj. jako v němčině, angličtině a ostatních germánských jazycích. (Francouzština a italština ho nezná vůbec.)

To znamená, že ve spojení "li povas havi" je náležité "-s-h-" a ne "-z-h-". A pozor, není to české "ch".

Esperantské "v" je skutečně znělý protějšek neznělého "f", tedy retrozubná frikativa, jaká je v češtině např. ve slově "stavba", ne však ve slově "voda". Rozdíl není velký, může být však dosti patrný. Kdo umí dobře vyslovit anglické "v" (neplést si s "w"! ), ten tento rozdíl pozná a může ho v esperantu použít.

### **Asimilace čili spodoba souhlásek**

Tam, kde se stýká souhláska znělá s neznělou, dochází k jejich přizpůsobení. Zpravidla se první přizpůsobuje druhé. Vyslovujeme proto "ogdek", "apsoluta", "egzisti", "lonktempe", "glafsonoro" apod. Chybou je ovšem "lafmašino", protože naše mluvidla nám docela dobře umožňují vyslovovat "lavmašino" atd.

"Subpremi" vyslovujeme jako zdvojené "pp" (viz dále).

Chybné je také "mi vidiz vin", "ĝiz revido", "sup la tablo", "vi aŭdaz min" apod.

### **Zdvojené souhlásky**

Ve slovech jako "sennombra", "ellerni", "superregi" se zdvojená souhláska vyslovuje dlouze. Ve slovech jako "ekkuri", "sed do", "subpremi" není nutno vyslovovat obě hlásky za sebou, ale s nasazením, malou prodlevou a jedním závěrem. "Sennombra" není ani co do výslovnosti totéž co "senombra".

### **Závěr**

Ty naše kurzisty a začátečníky, kterým např. výslovnost náležitého esperantského "h" a "v" činí potíže, můžeme uklidnit konstatováním, že výslovnostní odchylky některých hlásek u českých esperantistů nejsou vážnou překážkou dorozumívání (dají se považovat za varianty jednoho morfému, např. znělé "h" za českou (slovenskou) variantu esperantského neznělého "h", explozivní (ražené) české "v" (podobně jako nizozemské "w") za českou variantu esperantské znělé labiodentální (retrozubné) frikativy "v". Nutné se však musíme vyhýbat falešné asimilaci typu "lafmašino", "sup la tablo" a "mi vidiz vin". A daleko nejhroší je naprosto nepřijatelná dlouhá výslovnost přízvučných zavřených slabik ("lásta", "párto").

Mgr. Zdeněk Bršel

## MISINFORMO EN "ESPERANTO" PRI ĈEĤOJ KAJ GERMANOJ

En "Esperanto", organo de UEA, en la junio numero 1993, aperis artikolo "Ŝlosilo al najbara pordo" pri la ĉeĥa-germana kongreso en Karlovy Vary, verkita laŭ raportoj de d-ro Bormann kaj de mi. Per drasta mallongigo de mia teksto estiĝis misinformo, kvazaŭ kruelaj ĉeĥoj elpelis post la milito la senkulpajn germanojn el la komuna patrujo. (Mian originan tekston eblas legi en Star-to 4/93, p. 3). Protestis mi, s-ro Mařík kaj ankaŭ d-ro Bormann kaj ni ricevis pardonpetan leteron de la redaktoro Istvan Ertl (26-jara hungaro): "Certe la rapidado pro tiu lastminuteco kaŭzis, ke mi preteratentis tiklan punkton, kion Vi prave riproĉas al mi: mallongigante la raporton de s-ro Malovec laŭ la disponebla spaco, mi ellasis el la koncerna alineo tutan frazon pri la kontraŭĉeĥaj krimoj de germanoj dum la dua mondmilito. Mi opiniis, eble erare, ke tiuj faktoj estas ja pli konataj ol tiuj aliaj, kiujn mi ne forredaktis... Mi pensas, ke tiu ĉi kazo tre bone ilustras, kiom atentema devas esti redaktoro ĉe la redaktado de la ricevitaj tekstoj."

Miaflanke necesas klarigi, ke mi intencis prezenti esperantistojn kiel ekzemplon de interkompreniĝo, kiam ceteraj germanoj kaj ĉeĥoj kulpigas sin reciproke. Rifuzante ŝovinisman, kiu ĉiujn pekojn jetas sur la alian nacion, mi menciis la kulpojn de ambaŭ nacioj. Laŭdire kelkaj samideanoj forte koleras pro tio kontraŭ mi.

Dimanĉe la 14-an de novembro 1993 elsendis la dua televida programo dokumentojn pri la forŝovo. Ĝin decidis la venkaj potencoj, sed laŭ ĉeĥoslovaka peto. Laŭleĝaj forŝovoĵoj realiĝis nur en januaro 1946, tamen sovaĝaj kontraŭleĝaj forpeloj jam en junio 1945. Forpelataj estis ne nur faŝistoj, sed eĉ judoj revenintaj el koncentrejo, se ili parolis

germane. En kelkaj lokoj okazis publikaj ekzekutoj de civilaj personoj, inter kiuj estis ankaŭ virinoj kaj infanoj. En la banurbo Jánské Lázně ĉijare efektiviĝis referendumo, ĉu permesi al tiuj viktimoj krucon sur la tomo - 38% de civitanoj estis kontraŭ, 55% por, la ceteraj ne referendumis.

Kvankam estas certe, ke la germana nacio krimis pli ol la ĉeĥa, tamen ne eblas bagateliĝi krimojn de niaj homoj. Ĉie en la mondo okazas teruraj bestiaĵoj, ĉar oni senĉese aplikas principon de kolektiva kulpo. Kroato mortigas serbon, ties parencoj venĝas kontraŭ alia kroato kaj ties amikoj kontraŭ alia serbo. Similaj venĝoĉenoj generiĝas inter judoj kaj araboj, armenoj kaj azerbajĝanoj, katolikoj kaj protestantoj (en Irlando), inter nigruuloj kaj blankuloj (antaŭ du jaroj en Los Angeles) kaj ĉe ni - kvankam ne tiom akre - inter ciganoj kaj haŭtkapuloj.

Krimulon ne eblas puni per ekzekuto de lia infano aŭ de tute alia lia samlandano aŭ samlingvano. Ĝuste tia estas morala mesaĝo de Zamenhof, kiun li volis realigi per Esperanto: ke la boneco kaj malboneco de homoj estu juĝataj ne laŭ iliaj raso, nacieco aŭ religio, nek laŭ kulpoj aŭ meritoj de iliaj samrasuloj, samnacionoj aŭ samreligianoj, sed laŭ la persona respondeco, laŭ personaj meritoj kaj kulpoj. "Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratotoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj ktp." (L.L. Zamenhof en letero al N. Borovko pri la deveno de Esperanto). Kiam oni parolas pri naciaj kulturoj, historioj kaj lingvoj, ni rajtas fieri pri nia nacio, lando, urbo k.s., sed kiam temas

pri respondeco pro kulpoj, estas malmorale vidi iun alian ol homojn, anojn de la tuta homaro.

Miroslav Malovec

## Deklaro

Mi forte protestis al UEA kontraŭ la aserto pri krueleco de ĉeĥoj en 1945 kontraŭ germanoj en la revuo "Esperanto" de UEA, n-ro 6/1993, kun plena ellaso pri la kulpego de germanoj. - Kun mi plene konsentas s-anoj V. Novobilský, J. Kavka kaj V. Echtner.

J. Mařík

## Korektoj:

En **Starto n-ro 4/93**, en la biografio de V. Echtner, bonvolu korekti (p. 18, fino de la 1-a alineo): estu "reveno" anstataŭ "revuo"! P. 17, devus esti anst. Bohema: **Bohemia**. - P. 18 korektu "altsalajro" al alta salajro. "Rudé právo" estis ĝis nun tradukata (Kamarýt k.a.) Ruĝa pravo.

J. Mařík

Kiu deziras korespondi kun esperantistoj de Unuiĝinta Regno Granda Britio, bonvolu skribi al s-ro John Atkinson, 12 Boythorpe Crescent, Boythorpe, Chesterfield, Derbyshire, S40 2NX, Unuiĝinta Regno.



## Mortis Majstro Ota Sklenčka (1915-1993)

Ota Sklenčka, nacia artisto, tutlande konata kaj ŝatata eminenta aktoro, rolinto en sennombraj prezentadoj teatraj, filmaj kaj radiofoniaj, mortis en alta aĝo la 10-an de oktobro 1993. - Estante junulo, li helpadis en Hradec Králové al sia patro, siatempe tre aktiva ĉefdelegito de UEA en ĈSR, al lia movadlaborado. Antaŭ du jaroj li estis gastoj de la Esperanto-rondeto en Benešov u Prahy, por rakonti pri sia vivo.

Kvankam pro granda okupiteco en teatro, televido kaj filmo li ne partoprenis aktive nian movadon, li estis membro de nia asocio ekde ĝia fondiĝo en 1969 kaj almenaŭ morale subtenis la agadon, al kiu liaj gepatroj dediĉis multajn siajn fortojn. Pri ili ni legas en Enciklopedio de Esperanto:

**Sklenčka Otto**, ĉeĥo, bankoficisto en Hradec Králové. Nask. 2 nov. 1891 en Zbraslav n. Vl. E-isto de 1908. Ĉef. del. de UEA por Ĉ. depost 1923. Estas lia merito, ke laŭproportcie UEA-anoj en Ĉ superas ĉiujn landojn. Daŭre estis komitatano de ĈAE de 1930 ĝia kas. Sukcesega interna organizanto.

**Sklenčkova Božena**, ĉeĥino, edzino de O. S. Nask. 18 apr. 1897 en Ĉibuz. E-isto de 1919. Kunlaboris en Teritoria Oficejo de UEA (librotrenado, administrado de membroj de UEA, ĈAE).

En Ĉeĥoslovaka Antologio 1935 li tradukis fragmenton el Vladislav Vančura kaj ŝi el Karel Nový. Ilia fama filo naskiĝis la 19-an de decembro 1919.

## 78-a UK en Valencio

La kongresan urbon ni atingis sabate tagmeze, la 24-an de julio.

Valencion fondis romiaj soldatoj en la jaro 138 a.K., sed vere grava ĝi iĝis dum la 8-a jarcento. Dum plenaj 5 jarcentoj ĝi apartenis al Maŭroj. Tiun tempon postrestis kelkaj konstruaĵoj, ekz. Turoj de Serano. Valoras viziti ankaŭ la katedralon, en kiu miksiĝis kelkaj stiloj, bazilikon de la Virgulino, la urbo-domon, unu el la arkitekturaj perloj de la urbo.

La unua mia paŝo estis al la kongresejo (Palaco de Muziko) por preni la kongresajn materialojn. Poste ni estis lokitaj en diversaj tranoktejoj. La loĝkondiĉoj bedaŭrinde ne estis bonaj, precipe nesufiĉa estis la nombro de duŝejoj kaj necesejoj por tiom da homoj, sed al ĉio oni povas alkitimiĝi, des pli se oni pagas nur ĉ. 4 dolarojn tage.

Vespere ĉiuj kongresanoj (ĉ. 2000 el 70 landoj) estis invititaj al la plaĝo Sunset ĉe la lazura Mediteranea maro. Tie oni preparis grandan feston, dum kiu ni gustumis la specialan valencian rizaĵon, nomatan paella, kiun oni kuiris en unu ujo, ni trinkis vinon sangria kaj ĝuis muzikon kaj dancadon. Estis bona tempo por renkonti malnovajn geamikojn kaj ligi novajn kontaktojn. Ĉiu vesperano ricevis donace lignan kuleron surhavantan la kongresan simbolon.

La solena inaŭguro okazis dimanĉe, la 25-an de julio. Ĉiu eniranto ricevis beleĝan hispanan ventumilon de ĉarmaj hispanaj knabinoj naciĉestitaj.

La inaŭguro estis simila al ĉiuj antaŭaj, do komence la vorton prenis la prezidanto de UEA, J.Wells, poste sekvis prelego pri la kongresa temo "Klerigo en 21-a jarcento" kaj fine salutvortoj de landaj reprezentantoj de E-asoci-

oj. La malfermo finiĝis per la solena stara kunkantado de "La Espero".

Naŭ eminentuloj denove estis nomumitaj Honoraj Membroj de UEA: Werner Bormann (Germanio, 1931), Fernando de Diego (Venezuelo, 1919), Luis M. Hernandez Yzal (Hispanio, 1917), Richard Hirsch (Germanio, 1924), Grégoire Maertins (Belgio, 1924), Miĥail P. Mandrik (Bjelorusio, 1902), Nguyen Minh Kinh (Vjetnamio, 1914), Nguyen Hai Trung (Vjetnamio) kaj Edward Symoens (Belgio, 1915).

La solena fermo okazis sabate, la 31-an de julio je la 10-a horo. La vorton prenis prezidanto J.Wells, kiu resumis laboron de unuopaj grupoj diskutantaj pri la kongresa temo. Multe da aplaŭdoj ricevis infanoj el 12 landoj ĉeestantaj la Infanan E-kongreseton, kiuj kantis por ni. Poste sekvis lastaj adiaŭoj, kaj ĝis revido, eble iam, Valencio.

(Elzbieta Frenszkowska,  
Polujo)

### 6-a Internacia kultura festivalo en Ústí nad Labem

okazis en la tagoj de la 1-a ĝis la 3-a de oktobro '93 omaĝe al la naskiĝdatrevenoj de E-verkistoj J.Kořínek kaj d-ro T.Pumpur. Partoprenis ĝin preskaŭ 90 gesamideanoj, pli ol triono de ili venis el Germanio, Aŭstrio, Francio kaj Slovakio.

Enkadre de sabata prelega matineo paroladis i.a. Joachim Ginessner el Germanio pri utiligo de Esperanto en internacia fervoja trafiko; Michael Behr pri propono de mondkoncepto "Nova realismo"; Jar. Mráz pri Kosmaj kantoj de Jan Neruda kaj hodiaŭa astronomio; Jar. Mařík prelegis pri F.L.Lorenc kaj inĝ. Magda Feifířová pri TUTA '93 Žilina.

Posttagmeze efektiviĝis ek-skurso al aŭstria, prusia, fran-



cia kaj rusia monumentoj konstruitaj 10 km de Ústí nad Labem (apud Chlumeč kaj Přestanov) rememore al viktimoj de unu el napoleonaj bataloj en la jaro 1813.

Ĉefprogramo de la festivalo fariĝis sabata solena koncerto, dediĉita al 87-aj neĝisvivitaj datrevenoj de la naskiĝo de ambaŭ E-literaturistoj. Pri iliaj vivoj kaj verkadoj paroladis, kiel jam tradicie J. Mařík kaj prof. V. Novobilský. Eva Seemannová, nia fame konata E-a aktorino prezentis du Apokrifojn de K. Čapek, e-igitajn de J. Vondroušek, kaj du poemojn esperantigitajn de ambaŭ celebritoj; 9-jara Zuzanka Urbanová violonis, Bohunka Šrutová klarnetis, Ema Hubáčková kaj Miroslav Smyčka kantis operajn kaj operetajn ariojn kaj duetojn, dume Grete Scharf el Aŭstrio folklorajn kantojn de sia hejmlando. Krome kontribuis akordionisto Kamil Kříž kunkantante. Pianakompanis Jan Zimmel.

## FERVOJISTOJ

La fervojista sekcio nun havas 52 membrojn, inter ili 36 abonantojn de Internacia Fervojisto (72 Kč jare). La 27-a jarkonferenco okazis la 17-19.09.1993 en Česká Lípa (dudeko da partoprenantoj).

Dum la 45-a IFEF-kongreso en Cervia (6-12.06.1993) estis FS ĈEA oficiale akceptita kiel memstara Landa Asocio de IFEF. La faka kaj teknika komisionoj estis unuigitaj, la gvidanto iĝis József Halász (H), unu el la vicprezidantoj inĝ. Ladislav Kovář. En la faka programo prelegis inĝ. Kovář "Pri filozofiaj vidpunktoj de la signalado por ŝoseo-uzantoj sur traknivelaj pasejoj", Jindřich Tomíšek pri "Projekto de tunelo Ĉeĥio-Adriatiko", inĝ Jiří Vencl prezentis serion da lumbildoj pri historiaj veturoj en Ĉeĥoslovakio. Inĝ. Kovář montris duan numeron de Fervojistaj Kajejoj, per koncerto kontribuis Miroslav Smyčka.

Aŭguste realiĝis unusemajna trajnekskurso Prago-Innsbruck-Zuriko-Ĝenevo-Barcelono-Madrido-Salamenko-Lisboa-Fatima-Lurdo sub sukcesa ĉiĉeronado de inĝ. Jiří Vencl.

Terminara Komisiono gvidata de inĝ. Kovář daŭrigas preparadon de Ĉeĥa-Esperanta Fervoja Terminaro kaj tradukadon de LG V.

Venontjare la sekcio preparas Printempan Renkontiĝon en Opava (15-17.04.1994), karavanon al 46-a IFEF-kongreso en Krems (Aŭstrio) kaj postkongreson en Břeclav (21-24.05.1994).

J. Tomíšek

## BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1994

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Prozo:** Maksimuma longo 200x65 tajpospacoj. Tri premioj.

**Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 78-a UK: "Azio kaj la mondo". Premio Luigi Minnaja.

**Kanto:** Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin.

**Vidbendo:** Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

**Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1992. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1994. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1994. Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

## SAT

**Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)** estis fondita en 1921 en Prago dum la 13-a UK laŭ iniciato de Eŭgeno Lanti kiel organizo, kiu celas utiligi praktike la internacian lingvon por la klasaj celoj de la tutmonda laboristaro. Per plifaciligo de kontaktoj inter la membroj ĝi kreskigas ilian senton de homeca solidaro kaj klopodas servi ankaŭ al aliaj malsamlingvaj asocioj, kies celoj estas analogaj al tiuj de SAT. Ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka kaj kultura organizo ĝi gvidas siajn membrojn al komprenemo kaj toleremo rilate al politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatoj, kaj per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi malhelpas ĉe siaj membroj la dogmigon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj. Al ĉefaj taskoj kaj meritoj de SAT apartenas perado kaj helpado ĉe kreado de literaturaj beletra kaj faka, tradukita kaj originala. Verŝajne la plej grava kaj fama libro estas Plena Ilustrita Vortaro, aperinta unuafoje en 1970, kiun jam en 1928 antaŭis Plena Vortaro. Inter beletraĵoj aperis tradukoj kiel Tri verkoj de Volter (Kandid, Zadiĝ, Senartifikulo - 1956), La Fera Kalkanumo de Jack London (1930), Traviĵoj de la brava soldato Ŝvejk de Jaroslav Hašek (1934), Jimmie Higgins de Upton Sinclair (1934), Faŭsto de Goethe (1949). La organo de SAT estas gazeto *Sennaciulo*.

SAT-membroj dividiĝas je aktivaj kaj subtenantoj. La aktivaj devas scii Esperanton, pagi jarkotizon kaj helpi al aliaj SAT-membroj kaj respondi iliajn leterojn dum 15 tagoj. Rekompence ili ricevas Jarlibron kaj Sennaciulon kaj rajtas voĉdoni en la kongresoj kaj uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio.

Dum tagoj 29.-31.01.1993 okazis en sudmoravia urbo Strážnice kunveno de SAT-membroj el Ĉeĥio, kiun inter aliaj gastoj partoprenis ankaŭ sekretario de SAT kamarado Krešimir Barković el Parizo kaj ĝisnuna peranto de SAT por Ĉeĥoslovakio kamarado Miro Závodský el Žilina. Pro la bedaŭrinda disigo de la komuna ŝtato de ĉeĥoj kaj slovakoj necesis baloti pri nova peranto por Ĉeĥio. Ekde 30.01.1993 plenumas tiun taskon kamarado Vláďa Hasala, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice, telefono kun telefona registriilo (fakso): 0042/631/942 507.

La 66-a SAT-kongreso okazis en la bulgara Kazanlak (14.-21.8.1993, 300 personoj el 4 kontinentoj). La imponan inaŭguron - kun E-himno kantata de Ĥoro el Sofio - ĉeestis vicurbestro kaj sindikatanoj. En la nomo de E-klubo Ostrava-Poruba salutis la kongreson 13-jara Václav Hradecký, handikapulojn reprezentis Vlado Sládeček, kiu informis pri sukcesa propagando dum la internacia renkontiĝo en Františkovy Lázně. En la bunta programo kunvenadis diversaj sekcioj, liberpensuloj, vegetaranoj, instruistoj, okazis interesaj prelegoj pri kuracherboj, vivmaniero kaj kulturo, duontagaj ekskursoj al diversaj lokoj en Bulgario, kantis kaj dancis folkloraj grupoj, E-teatro el Sofio prezentis teatraĵojn "Mi ne plu konas vin" kaj junularo ĉiuvespere ĝuis diskotekojn.

### LA 67-AN SAT-KONGRESON ARANGAS STRÁŽNICE

kiel la plej gravan E-eventon de ĈEA en la jaro 1994 (16/23 julio). La kongreson antaŭos antaŭkongreso en Prago (1994-07-09/16) kun riĉa turisma kaj kultura programo ne nur en la pitoreska historia ĉefurbo de Ĉeĥio, sed ankaŭ en la belega ĉirkaŭaĵo. Samtempe en la sama hotelo okazos faka kolokvo organizita de Akademio de Esperanto (1994-07-07/14). La lastan tagon la antaŭkongresanoj kaj kolokvanoj komune busos al Strážnice tra la mezepoka perlo Kutná Hora.

Strážnice, situanta en la sudorienta angulo de la Ĉeĥa Respubliko proksime al la landlimoj kun Aŭstrio kaj Slovakio, estas ofte nomata "Perlo de la sudmoravia folkloro" pro la ĉiujaraj folkloraj festivaloj kaj subĉiela muzeo de popola arkitekturo, sed ĝi famas ankaŭ pro tre bongusta vino.

Tuj post la kongreso estos aranĝata komuna favorpreza flugkaravano al la 79-a Universala Kongreso en la korea Seulo kun sekva 4-taga vizito de Japanio (elektu inter turisma programo en Tokio kaj la unua japana studadsesio de AIS San Marino).

### Kongreskotizoj:

SAT-membro	280.00	340.00	420.00 FF
SAT-geedzoj	460.00	550.00	690.00 FF
SAT-gejunuloj	140.00	170.00	210.00 FF
Gasto	390.00	470.00	590.00 FF
Gast-geedzoj	560.00	670.00	840.00 FF

### LA ESPERANTO-REDAKCIO DE LA POLA RADIO VARSOVIO PREMIITA

En la ĉi-jara Universala Kongreso en Valencio la Estraro de UEA aljuĝis la premion Onisaburo Deguchi al la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio Varsovio. La premion oni aljuĝas ĉiujare por agado, kiu pere de Esperanto antaŭenigas internacian amikecon kaj solidaron.

La Esperanto-programoj de la Pola Radio meritas tion kaj precipe meritas, ke ĉiam pli multaj esperantistoj aŭskultu la valorajn kaj multenhavajn elsendojn. La Esperanto-programoj el Varsovio estas disaŭdigataj ĉiutage:

de la 15.30 ĝis la 15.55 h per frekvencoj 9525, 7145, 6095 kaj 1503 kHz, t.e. mallongaj ondoj 31,50m, 41,99m kaj 49,22m kaj meza ondo 200m,

de la 22.30 ĝis la 22.55 h per frekvencoj 7285, 7270, 6095 kaj 1503 kHz, t.e. mallongaj ondoj 41,18m, 41,26m kaj 49,22m kaj meza ondo 200m.

Aŭskultu la elsendojn kaj viajn opiniojn, demandojn, dezirojn aŭ kritikojn skribu al la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Box 46, 00-950 Varsovio.

Pola Radio elsendas en multaj lingvoj, sed precipe la Germana, Esperanta kaj Angla Redakcioj ricevas sufiĉe da leteroj de la aŭskultantoj. Dum la unua duono de la nuna jaro la Germana redakcio ricevis 1462 korespondaĵojn, la Esperanta redakcio 1077 korespondaĵojn, la 3-an lokon okupis la Angla redakcio per 684 korespondaĵoj. Do en la Pola Radio la Internacia Lingvo Esperanto estas tre grava kaj alte aprezata fenomeno, kiu per la nombro de ricevitaj korespondaĵoj superas eĉ la anglan lingvon. Kie aliloke oni povas diri, ke Esperanto superas la anglan?

Eble estus interese scii, el kiuj landoj venis la korespondaĵoj. Plej multaj leteroj venis el Germanio (279), sekvas Finnlando (213 leteroj), Nederlando (111), Svedio (71), la 5-an lokon okupas nia Ĉeĥa Respubliko (68 leteroj), sekvas Francio (55), Aŭstrio (37), Estonio (36), Italio (33), Litovio (30) kaj vico da aliaj malpli grandaj landoj kiel Norvegio, Britio, Rusio, Hungario, Slovakio, Danlando, Hispanio k.a. Per leteroj aŭ poŝtkartoj al la Pola Radio vi subtenos la pozicion de la Esperanto-redakcio kaj per tio la Internacian Lingvon entute, sed samtempe vi pruvos la fortecon kaj vigecon de la movado en nia lando.

## Medicinista konferenco en Hungario

MUDr. Eva Kopečná

En la tagoj de la 8-a ĝis la 11-a de julio okazis jam la 9-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en la urbo Veszprém. Partoprenis ĝin proksimume sesdeko de gekuracistoj, flegistinoj, geapotekistoj kaj aliaj medicinistoj el 12 landoj. La kongreso okazis en la gastigema ĉefurbo de la montaro Bakony, universitata urbo kaj industria centro de la regiono. La ĉeftemo de la konferenco estis "Sanitara kunlaboro inter eŭropaj landoj".

En la programo estis prezentitaj pli ol 20 prelegoj el diversaj fakoj de medicino kaj je diversaj temoj, kiuj havis altan fakan nivelon kaj estis akompanataj per multaj diapozitivaj kaj videobendoj. El la pli allogaj prelegoj mi menciuj tiun de W. Opaka, kiu parolis pri historio kaj rezultoj de la trijara laboro en UMEA Shinoda-kuracejo en Krakovo, kie oni uzas la metodon de Massayuki Saionji, tre interesan prelegon de prof. Makabe Rokuro pri oftalmologio en Eŭropo, la prelegon de Biksé di None pri "Lyme-boreliozo", de Farago K., la hungara bibliotekistino, kiu faris profundan sondon en historion de daŭre disvastiĝanta malsano diabeto. Ing. Petr Chrdle parolis pri rolo de fakaj primedcinaj periodaĵoj kaj tiucele li tuisis la fakan cirkuleron "Sano", kiu estas multjare eldonata (fare de ĈEA) kaj redaktata (fare de MUDr. J. Hradil) en nia lando kaj nun pro manko de financaj rimedoj ĝi ekstaris antaŭ bankroto. Ing. P. Chrdle decidigis plu eldoni ĝin private kaj tiamaniere savi ĝin por fakula publiko. Li skizis siajn imagojn pri nova aspekto de la gazeto kaj sian planon propagandi ĝin en la medio de San-Marina AIS esperante trovi tie ĉi apogon. Al la plej brilaj kontribuaĵoj de la tuta konferenco apartenis la prelego de S. Derev-

janniĥ je la temo "Alloplant - nova generacio de transplantajoj".

La fakan programon de la konferenco kompletigis socia kaj distra parto. La gastigantoj preparis por ĉeestantoj posttagmezan trarigardon de la urbo kaj akcepton en la urbodomo. En la tria tago okazis vizito de la fama landa Korhospitalo kaj sanatorio en Balatonfüred, kiu servas precipe por pacientoj post la korinfarkto por daŭrigi ilian sanreĥavigon komenciĝintan jam dum ilia restado en la sekcio de intensiva prizorgo. Tie kuracistoj preparas la pacientojn antaŭ operacioj.

La viziton de la hospitalo sekvis agrablaj horoj de banado kaj ripozo sur Balatona plaĝo kaj promenada ŝipveturo kun la muziko sur ferdeko. Interkonan kaj adiaŭan vesperojn oni aranĝis en la tre agrabla restoracio Szürke Barát kun riĉa hungara manĝaĝo, kukoj, vino kaj aliaj trinkaĝoj. Dum la adiaŭa vespero regis vere verdfamilia etoso, la partoprenantoj kantis kantojn en Esperanto kaj en siaj naciaj lingvoj. Plej multe estis aplaudita cetere profesoro Makabe.

La venontjara IMEK okazos en la jaro 1995 en Ternopil, Ukrainio.

### Ni gratulas

Jaroslav Mařík ĝisvivis la 22-an de decembro 1993 sian 80-jariĝon kaj Pavel Sittauer la 4-an de januaro 1994 60-jariĝon. Ambaŭ estas Honoraj Membroj de nia asocio. Pri Jaroslav Mařík ni jam skribis (2/92), Pavel Sittauer estas konata precipe kiel iniciatinto kaj multjara prizorganto de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov kaj kun ĝi rilatantaj publikaĝoj, precipe reelndoj de verkoj de T. Kilian, Gramatiko de Malovec k. s.

## Penzion Espero

Ve středu 27. října 1993 jsme dle pozvánky uveřejněné v bultenu Verda Familio přijeli do Loukova na nádraží, kde nás již čekalo auto, aby nás odvezlo pár kilometrů do blízkých Skokov, do nového penzionu Espero, jehož majitelem a provozovatelem je všem známý esperantista MUDr. Josef Hradil.

Přijeli jsme do nad očekávání hezkého a příjemného prostředí, které svým vybavením a službami poskytovanými hostům dává plnou možnost strávit zde příjemný odpočinek, který dle chuti a kondice účastníků lze doplnit jak nenáročnými procházkami, tak příjemnou turistikou do kouzelných koutů Českého ráje. Je zde ideální místo pro různé konference, školy v přírodě, jazykové semináře a hlavně pro setkání početnějších skupin esperantistů.

Penzion Espero s domácí kuchyní má 60 lůžek ve 2-5lůžkových pokojích, jídelnu, společenský salon, klubovnu s krbem, televizi a videem, bar, tělocvičnu, saunu, 6 bezbariérových pokojů pro vozíčkáře. V penzionu bude obnovena tradice skokovských lázní s masážími, vodoléčbou, připravují se pobyty pro pacienty s civilizačními nemocemi atd. K dispozici je též zdravotní personál. V uzavřeném prostoru, kde je možné parkování automobilů, stojí řada čtyřlůžkových chatiček, volejbalové hřiště a dosti prostoru pro postavení stanů či umístění karavanů.

Ale my jsme nepřijeli jen odpočívat a vychutnávat krásy zdejší přírody, ale vyměnit si zkušenosti a přátelsky si pohovořit s esperantisty, kteří sem přijeli z Jablonce, Ml. Boleslavi, Doksů, Č. Lípy, Prahy, Slaného, Pardubic a Mimoně. Měli jsme štěstí, že po dobu našeho čtyřdenního pobytu vládlo nádherné podzimní počasí. Každý den po večeři jsme zasedli ke společnému stolu a věnovali se

problémům, které v současnosti hýbou esp. hnutím, a abychom naše názory vyslovovali v esperantu a využili tuto málo častou příležitost k živé konverzaci v našem mezinárodním jazyku.

Tyto společné večery byly pro nás příjemně poučným a nezapomenutelným zážitkem v dobrém kolektivu, který si výborně rozuměl a také do budoucna si vytvořil určitou perspektivu k další plodné spolupráci, kterou umožňuje vždy jen přímý osobní kontakt.

Doporučujeme esperantským klubům, aby propagovali hlavně využití zimního a jarního období, kdy pension není tak obsazen. Aby se přijeli podívat i ve větším kolektivu a strávili v penzionu aspoň víkendy, když ne celý týden. 3x denně dobré domácí jídlo a nocleh v komfortně zařízeném pokoji za 160,- Kč není v dnešní době předražené.

Pište přímo na adresu: Penzion Espero, Skokovy, 294 12 Žďár u Mnichova Hradiště. Telefon 0329/59256.

JARY

### Pozn. redakce:

Penzion "Espero" vznikl v bývalých rašelínových a vodoléčebných lázních Skokovy, 10 km od Turnova, v srdci Českého ráje, v nádherné přírodě vybízející k procházkám v údolích a hlubokých lesích Okolí nabízí lákavé cíle pro turisty. Penzion má moderní kuchyni, klubovnu s krbem, saunu, stolní tenis. V místě je jezdecký klub. Ubytovací kapacita 61 lůžek, 6 pokojů je bezbariérových. Plná penze 160 Kč, pro esperantisty jen 120 Kč. Spojení: MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 1161, tel. 0329/2284 (poliklinika).

Pensiono "Espero" estiĝis en la torfa kaj akvokuraca banloko 80 km de Prago en bela regiono kun arbaroj, lagoj kaj rokoj. Inter 22 ĉambroj kun 61 litoj estas 6 senbarieraj.

## Vizite Ĉe la grupo TEAM (laŭ Zdeněk Smíšek el Rudé Právo 5.11.1993)

La slovakaj grupo TEAM muzikas dek tri jarojn, kaj ĝia populareco ne ŝrumpas. Kvin muzikistoj kontentiĝis kun la fakto, ke la sesa - simbolulo de la grupo Pavol Habera - katenas al si atenton de la adorantoj kaj perdas sian privatan vivon. La grupestro kaj gitaristo Dušan Antalík (19. 2. 1958), kantisto Pavol Habera (12.4.1962), klavisto Milan Dočekal (6.5.1959), basgitaristo Ivan Válek (14.4.1961), klavisto Bohuš Kantor (13.3.1964) kaj tamburisto Ivan Marček (16.7.1952) estas homogena kaj kamaradema teamo, kiu komune aranĝas komponaĵojn kaj ĝojas, ke ili apartenas al la plej popularaj muzikgrupoj en nia teritorio.

**Ĉu vi ankoraŭ memoras la tempojn, kiam vi strebis pri sukceso kiel grupo kantanta en Esperanto?**

**Ivan Válek:** Vere, ĝi estis etapo, kiam ni klopodis tiamaniere penetri en konatecon kaj ankaŭ en la mondon. Kaj ni sukcesis. En Svislando en la okdek unua jaro ni surbendigis kazedon, tiam ni ankoraŭ ludis amatore kaj kvarope. Tiutempe mi kapablis interkompreniĝi Esperante, sed nun ion elbuŝigi, ne plu.

**Ivan Marček:** En la grupo mi tiam ankoraŭ ne membris. Sed ankaŭ mi deziras interkompreniĝi. Nun kun ni koncertas civitano nigrahaŭta - Ibrahim Maiga el Malio. Mi demandis lin, kiel ilialingve diri la belan kaj admirindan vorton ami. Liareponde - jebani.

**Dušan Antalík:** Ĉiam interesis min la ideo, ke dank' al lingvo vi povas egali al ĉiu, de kiu ajn angulo de la tero li estu. Ĝi pruviĝis per nia Esperanta vojaĝŝnuro, kiun ni entreprenis antaŭ jaroj tra Nederlando, Germanio aŭ Britio. Estis entuziasme komu-

niki kun franco, anglo, vjetnamo, japano ... Kun nia nuntempa manaĝero ni kunlaboris komence pro Esperanto, kiun li instruis al ni. Stano estas pasia esperantisto! Sed samtempe estas fakto, ke en la populara muziko validas kiel Esperanto la angla. Tamen se iu invitus nin koncerti okaze de interesa esperantista renkontiĝo, ni certe akceptus.

*Aldono de la redakcio:  
Kaj ni povas informi, ke la muzikgrupo TEAM jam promesis sian partoprenon okaze de la scienca konferenco*

## ETNOJ KAJ LA NATURO

okazonta en 1995 en Poprad laŭ iniciato de la konata rusa esperantisto Lev Medvedev, doktoro pri biologio, kiu intencas tiamaniere prezenti Esperanton ankaŭ al neesperantistaj sciencistoj. La lingvoj de traktado kun simultana interpretado estos Esperanto, la slovakaj kaj iu el la mondlingvoj (angla, rusa, germana ... laŭ nombro de samlingvaj aliĝintoj). Gravus ne trudi la internacian lingvon, sed montri ĝiajn eblojn kaj avantaĝojn apud aliaj lingvoj.

-mm-

## Esperanto en "Naše rodina"

Populara ĉeĥa gazeto "Naše rodina" (Nia familio) komencas publikigi Esperanto-kurson el la plumo de sperta lernolibra aŭtoro Josef Cink. Enkondukojn verkis Jaroslav Mařík pri la monda Esperanto-valuto kaj Daria Michalová-Sokolová pri la katolika Esperanto-Tendaro en Sebranice.

-mm-

FABELO PRI DU REĜIDOJ AŬ ĈU ESTIS AŬ NE ESTIS?

Antaŭ longa, tre longa tempo - sed ĉu vere tre longa? Prefere denove. Iam kaj ie vivis maljuna saĝa reĝo kaj havis du belkreskajn filojn. La reĝlando estis nek granda, nek malgranda, ĉiuj popoloj tie vivis bele kaj kontente. Ĉiuj amis sian maljunan reĝon kaj siam belan landon kaj kun granda amo ĝin kulturis. Por monaviduloj, malhonestuloj, pigruuloj kaj maliculoj tie ne estis loko.

Sed neniam io daŭras eterne. Venis tempo, kiam la reĝan kapon kovris grizaj haroj, la vidpovo malfortiĝis kaj en la reĝan korpon komencis malrapide kaj sensone enŝteliĝadi la morto.

La maljuna reĝo venigis al si ambaŭ reĝidojn kaj alparolis ilin:

"La kandelo de mia vivo malrapide estingiĝas, mi maljuniĝis, la krono estas por mi tro peza, kaj la sceptron mi ne plu tenas en la mano. Venis tempo, ke mi transdonu la regadon al pli juna persono. Vi scias, ke nia reĝlando estas nur unu, nek granda nek malgranda, sed kun homoj saĝaj kaj laboremaj, sed vi estas du. Mi amas vin ambaŭ egale, vi ambaŭ same karas al mia koro. Tial mi decidis, ke regos tiu el vi, kiun elektos miaj regatoj. La alia ricevos ĉion, kion li bezonos, sufiĉe da mono kaj ĉevalon, por rajdi en la mondon serĉi feliĉon, aŭ li povos elekti unu el multaj kasteloj de nia reĝlando kaj tie vivi trankvile kaj kontente."

La maljuna reĝo silentiĝis, la laca kapo sinkis sur la bruston, sed post malgranda ripozo li ekrigardis siajn filojn. Antaŭ liaj okuloj aperis bildoj de la pasinteco - kiel liaj filoj kreskis, kunvivis pace kaj simile. Por momento lia koro kunpremiĝis pro mallonga angoro. Tio estis antaŭ-

timo - pri la reĝolando kaj pri la popolo.

La pli aĝa reĝido ekparolis kiel la unua:

"Paĉjo, nia kara paĉjo, mi promesas al vi en mia nomo, ke mi respektos vian volon kaj deziron. Mi promesas je mia honoro!"

La pli juna reĝido, staranta ne malproksime de la trono, okulsekvis sian fraton, kun malgaja rideto aŭskultis lian parolon kaj pensis la sian. Poste ankaŭ li aŭdiĝis:

"Ankaŭ mi promesas al vi, mia kara paĉjo, je mia honoro, ke mi respektos vian deziron kaj la volon de nia popolo!"

Tiel la filoj juris al la patro obei lian volon. Poste la maljuna reĝo konfidis sian animon al Dio kaj sian korpon al la patrino tero.

La filoj kunvokis la popolon el la tuta reĝolando kaj la korpon de la mortinta reĝo ili eksponis sur katafalko en la kastela kortego. Por la funebraj ceremonioj ili invitis ankaŭ reĝojn el najbaraj monarkioj. Pompa kaj grandioza estis la enterigo, kiun la bonaj filoj preparis. La popolo sincere priploris la forpasintan reĝon kaj rigardis en la estontecon kun malcertaj antaŭtimoj.

"Kio nun okazos kun ni?" ili demandis sin en la animo, "ni havas unu reĝolandon, sed du reĝidojn, kiuj nesufiĉe amas unu la alian, ĉiu el ili dezirus regi."

Post la enterigo la funebraj rantoj disiris hejmen.

Ne daŭris longe, kaj la reĝaj heroldoj anoncis al la popolo, ke ĉiuj homoj preparu sin por elektado de nova reĝo, ĉar ankaŭ abeloj havas sian reĝinon, ŝafinoj sian virŝafon kaj lupidaro sian lupan estron.

Sed ankoraŭ pli frue, ol la heroldoj alvokis la popolon,

ambaŭ reĝidoj decidiĝis lasi nenion al hazardo, ĉar ĉiu el ili volis regi. Siajn kurierojn ili ekipis per mono kaj promesoj kaj sendis ilin inter la homojn. La kurieroj promesadis ĉion imageblan, al la popolo kontenton, bonfarton, kvieton kaj pacon, al la popolestroj novajn privilegiojn. La reĝidoj eĉ adresis sin al fremdaj reĝoj por peti helpon en la batalo pri la potenco.

En la apuda reĝolando regis malbona kaj malica reĝo, kiu jam de longe preparis siajn dentojn por formordi la regnon de sia najbaro. Dum vivis la maljuna bona reĝo, li nenion kuraĝis fari, sed post lia morto li decidis aneksi lian landon per ruza artificio kaj mamono. Li trapensis planon, kiel plej rapide atingi sian celon, kaj en la planon li enkalkulis ankaŭ la du reĝidojn, ĉar li sciis, ke regi volos ambaŭ.

La kurieroj de la reĝidoj venis ankaŭ al li. La malica reĝo ilin akceptis, ĉiun aparte, kaj en la animo li jam interfrotis la manojn pro ĝojo, ke lia sopirego komencas plenumiĝi tiom facile. Li promesis al ambaŭ sian helpon kaj subtenon.

Post certa tempo la malbona reĝo vizitis la pli aĝan el la fratoj. Tiu lin bonvenigis respektoplene kaj je lia honoro aranĝis riĉan festenon. La malica reĝo ĉe gaja festeno lin alparolis:

"Vi estas la pli aĝa, tial la reĝado prave apartenas al vi. Mi helpos vin. Vi ambaŭ ne povas vivi en unu reĝolando! Vi estas la pli saĝa kaj la pli riĉa, kaj ĉefe - se regus via frato, vi nur devus pagi liajn ŝuldojn kaj multon trasuferi, ĉar li neniam lasus vin vivi en trankvilo."

Kaj li persvadis la reĝidon tiom longe, ĝis ŝajnis al li, ke la junulo englutis lian logaĵon. Apenaŭ rimarkeble li ekridetis, kaj ili iris dormi. La sekvan tagon li forveturis al la pli

juna el la fratoj kaj sciigis lin inter kvar okuloj ankaŭ dum festeno:

"Kara reĝido, via pli aĝa frato estas konvinkita, ke li rajtas regi, ĉar reĝado super la tuta lando devas aparteni al la unu-enaskito." Kaj kun flatoj li persvadis lin: "Vi saĝas pli ol li, via riĉaĝo estas komparebla, kial vi restu malprofitanta? Dividu la landon, ĉiu el vi reĝos en sia parto, kaj vi vidos, kiel bonege vi prosperos kaj ke mi pravis. Mi helpos vin en ĉio. Kaj se vi alianĉiĝos kun mi, vi povas lin venkobati kaj iĝi same riĉa kaj potenca kiel mi."

La reĝido respondis: "Sciu, reĝo, mi promesis al mia patro obei lian volon kaj neniam permesi, ke nia reĝolando disdiiĝu. Mi juris."

La malbona reĝo kontraŭdiris: "Kara reĝido, ĵuro estas unu afero, ago alia. Ĉio dependas de cirkonstancoj. Ni potenculoj povas promesojn plenumi, sed ni ankaŭ rajtas ilin rompi, fari escepton. Kvankam, farinda ĝi ne estas."

"Sed mi," oponas la pli juna reĝido, "mi amas mian fraton, mi ne volas lin perfidi, kaj plie: mi timas!"

Tamen li foriris en sian ĉambron kaj multe cerbumis.

Matene la malbona reĝo forveturis en sian regnon.

Ankaŭ la pli aĝa frato multe meditis pri tio, kion diris al li la malbona reĝo, kaj venis al konkludo, ke li regu mem, ke la fremda reĝo fakte pravis.

Venis la tago de reĝo-elektado. Sur vasta ebenaĵo antaŭ la muregoj de la regurbo kunvenis la tuta popolo kun siaj popolestroj. La elektantoj dividiĝis je du partoj, ĉar unuj volis kiel sian reĝon la pli aĝan reĝidon, la aliaj male deziris, ke reĝu la pli juna. La elektado daŭris la tutan tagon kaj kulminis per malgrandaj interpugnoj, sed la reĝo ne estis elektita. La stul-



tecon fine kronis ambaŭ reĝidoj. La pli aĝa kolere ekkriis:

"Mi estas pli aĝa, mi rajtus regi! Sed se ne eblas alimaniere, ni dividu la reĝolandon je du duonoj, kaj ni vidos, kiu regos pli bone. Kiu amas kaj kredas min, venu al mia flanko!"

La pli juna reĝido replikis: "Kiu ne volas suferi sub la regado de mia frato, kolektiĝu ĉe mia flanko!"

Kaj la popolo disdiviĝis kiel stulta ŝafaro sen virŝafo.

En la animo ambaŭ reĝidoj penis: "La popolo taŭgas por servi kaj doni profiton."

La pli juna reĝido turnis sin al sia frato kaj alparolis lin:

"Frato, malbone ni aĝas, kiam ni disiras en kolero kaj kiam ni dividas je du partoj la reĝlandon de nia mortinta patro. Per tio ni malfortigas unu la alian. Venos tempo, kiam nia popolo malbenos nin, ĉar ni dividis multajn familiojn, starigis patron kontraŭ filo, kaj filon kontraŭ patro, familion kontraŭ familio, ĉiuj malamos sin reciproke!"

Kaj tiel la fratoj iĝis malamiko, kaj la homogena, honesta kaj laborema popolo transformiĝis en du malpacajn, kverelantajn popolojn.

Ĉe la landlimo, kiu eĉ vera landlimo ne estis, oni starigis gardistojn, faris al si reciproke diversajn malicaĵojn, malamis kaj priklaĉis sin. En la landon komencis revenadi diversaj malhonestuloj, maliculoj, avaruloj kaj ĉia aĉularo, por paraziti malprofite al la popolo. Ili ĉiam klopodis predi ĉion, kio estis predebla, kaj ambaŭ reĝoj obeis iliajn konsilojn. Rekompence ili ricevis privilegiojn kaj grandajn posedaĵojn kaj senĝene mizerigis la popolon. La reĝoj ŝarĝis la popolon per ĉiam pli grandaj impostoj por kolekti rimedojn por sia pli komforta kaj pli riĉa vivo, aranĝadis abundajn festojn kaj aliajn amuzojn, ilian

ekzemplon sekvis ankaŭ la popolestroj.

Nu, kaj la homoj? Tiuj estis ĉiam pli kaj pli malkontentaj. La lando komencis malriĉiĝi kaj la popolo nur nun komprenis, kio okazis. Ĉiutage ili rememoris la maljunan saĝan reĝon kaj la tempon, kiam ili kontente florigis kaj ĉarmigis sian landon, kiam ili riĉiĝis kaj naskis sanan idaron.

Ekde tiu tempo ili rememoras kaj rememoras. Rememori estas pli facile ol rezisti maljustaĵon. Kaj la infanoj? Al tiuj ili rakontas fabelon pri du reĝidoj, kiuj ne rezistis al potenco kaj forto de mono kaj kiuj dividis iun belegan reĝolandon.

Sed nenio daŭras eterne. Venis tempo, kiam la pokalo de sufero kaj pacienco superpleniĝis. Post ĉiuj malfacilaĵoj la popolo de la dividita reĝlando fine komprenis, ke tiel ne eblas plu. Kaj ...?

## PEN-klubo agnoskis Esperanton

La 10-an de septembro, dum sia 60-a Internacia Kongreso en Santiago de Compostela (Galegio, Hispanio), la tutmonda verkista asocio PEN akceptis kun tre granda plimulto la aliĝon de Esperanta PEN-Centro. EPC, kiu nombras 21 membrojn, estis fondita en 1991 de Perla Martinelli, Giorgio Silfer kaj la nuna prezidanto, István Nemere. Dum la kongreso, kiu agnoskis Esperanton kiel literaturan lingvon, Silfer aktive kontribuis al la diskutoj, speciale al la debato pri la situacio de verkistoj en eks-Jugoslavio.

(laŭ "Esperanto")




## La "dometoj" sub akvo

En akvo vivas multaj interesaj animaloj. Ili estas plejparte malgrandaj, tial ilin plimulto da homoj ne rimarkas. El ili interesa grupo estas triĥopteroj (ĉeĥe: chrostíci). Ili estas ordo de insektoj. Maturaj triĥopteroj (fig. 1 kaj 2) estas malgrandaj neokulfrapaj insektoj, kiujn oni povas vidi ĉirkaŭ akvoj. Ili similas al malgrandaj papilietoj, iliaj flugiloj estas brunaj aŭ grizbrunaj, iam kun pli malhelaj makuloj. Ili sidas sur plantoj aŭ flugetadas, ili nutriĝas per nektaro de floroj.

Post fekundiĝo femaloj metas ovojn en longformaj gelatenajaj ovdemetaĵoj sur bordojn de akvoj aŭ sur akvajn plantojn alkreskantaĵn al surfaco. El ili eloviĝas larvoj, kiuj vivas sian tutan vivon en akvo. Ili vivas en stagnantaj kaj ankaŭ fluantaj akvoj. La larvoj de triĥopteroj estas de du tipoj.

La unua tipo estas cilindroformaj larvoj (fig. 3), kies abdomeno estas mola kaj blanka. Por ŝirmado de sia abdomeno ĉi tiuj larvoj konstruas al si tuboformajn porteblajn ŝirmilojn. Materialo por ĉi tiuj ŝirmiloj estas sableroj, partoj de plantoj, konketoj de moluskoj ktp. Plantojn la larvo dismordas en malgrandajn pecetojn. Partojn de la ŝirmilo kunigas la larvo per maldikaj fibroj, kiujn ĝi eligas el malsupra lipo. Grandeco kaj formo de la ŝirmilo estas por ĉiu specio tipa. Kreskante la larvo procede alkonstruas la ŝirmilon. Larvoj, kiuj al si konstruas ŝirmilojn, voras plantojn, foliojn falintajn en akvon, iuj voras malgrandajn animalojn, aliaj estas ĉiovoraj.

La alia tipo estas larvoj kun svelta dura abdomeno. Ĉi tiuj



larvoj vivas precipe en fluantaj akvoj. Tie sub ŝtonoj ili konstruas al si funelformajn kaŝejojn. En tiujn ĉi retetojn ili kaptas malgrandajn animalojn, kiujn alportas akva fluo. La larvoj de tiu ĉi tipo, kiuj vivas en stagnantaj akvoj, konstruas inter plantoj al si retojn, en kiuj ili kaptas malgrandajn animalojn, simile kiel aranec muŝojn en araneaĵojn.

Elkreskinte la larvoj krizalidiĝas. El krizalido poste elrampas matura triĥoptero.

Larvoj de triĥopteroj estas grava parto de fiŝa nutraĵo. Ankaŭ maturaj triĥopteroj falintaj sur la surfaco de akvoj estas vorataj de fiŝoj.

En nia lando vivas multaj specioj de triĥopteroj. Iliaj larvoj vivas en diversaj tipoj de akvoj. Larvoj de certaj specioj estas specialigitaj por certaj tipoj de akvoj. Ili indikas purajn akvojn.

### Akva araneo - argironeto

Araneoj estas tre konataj animaloj. Unu el ili, argironeto (ĉeĥe: vodouch stříbřitý) estas tre interesa. Kiel unu sola araneo ĝi vivas en akvo.



La longeco de masklo estas 15 milimetroj, la longeco de femalo 9 milimetroj. La koloro de ĝia korpo estas bruna. La tuta korpo estas kovrata de haretoj. La haretoj kaŭzas, ke la surfaco de argironeto estas en akvo kovrata per maldika tavolo da aero. La argironeto aspektas kiel arĝenta globeto. La tavolo da aero sur la korpo ebligas spiradon ĉe moviĝado en akvo. Oksigeno difuzas el akvo en ĉi tiun tavolo da aero.

La argironeto vivas en malprofundaj stagnantaj akvoj kun densa flaŭro. Inter plantoj ĝi konstruas sian loĝejon, araneaĵan kloŝon, kiu havas 2 cm en diametro. Ĉi tiun kloŝon ĝi plenigas per aero. Tie ĝi vivas kaj digestas sian predon, t.e. malgrandajn akvajn animalojn, precipe krustulojn kaj larvojn de akvaj insektoj. Kiam la aero en la kloŝo estas elspirita, la argironeto faras en supro de la kloŝo malfermaĵon kaj la aero fuĝas. La argironeto poste riparas sian kloŝon kaj plenigas ĝin per nova aero.

Por ovometado la femalo konstruas specialan grandan kloŝon sub la surfaco de akvo. En la supran parton de la kloŝo ŝi metas la ovojn kaj gardas ilin. Dum tio ŝi ne akceptas nutraĵon.

Eloviĝintaj idoj restas en la kloŝo, poste memstariĝas kaj konstruas siajn malgrandajn kloŝojn. La argironeto vivas du jarojn, travintras ofte en malplena moluska konko.

La argironeto estis en konvenaj akvoj sufiĉe abunda. Sed en lastaj jaroj ĝi fariĝas rara. Tial ĝi estas lokita en la "Ruĝa libro de endanĝerigitaj kaj raraj specioj de plantoj kaj animaloj."



**Enkonduko**

Alta lingva prezento rilatas sendube al beletro kaj poezio, kiuj per vortoj komunikas ĉion eblan kaj ankaŭ malfacile imageblan, malracionalan. Alta lingva prezento rilatas ankaŭ al la faka literaturo, kiu per vortoj komunikas sciojn kaj opiniojn. Unuavide la sama tasko de homa lingvo. Sed nur unuavide, ĉar vorto prezentita de homo estas de li rubate stampita, dum vorto de sciencisto ne estas vorto, sed nocio en vorton enkorpiĝinta, fenomeno nepersona, nur forme obeanta gramatikon.

La filozofo Josef Ŝafařík diris, ke per nocioj ne eblas preĝi, blasfemi, ne eblas kanti nek insulti, ami nek bedaŭri, ĝoji nek nostalgii, adori nek malhonori. Laŭdire per nocioj ne eblas home pensi, nur nehomece logiki, kalkuli, analizi, dedukti.

La antinomian streĉon inter vorto kaj nocio en la supra prezento oni klare perceptas. Nia reala ĉiutaga mondo permesas la diferencon konscii al personoj, kiuj parte agas science, parte kondutas kiel homoj: vivas ankaŭ por aliaj aferoj krom profesio, perceptas naturon, havas familion, amas, scipovas ĝoji kaj konflikti.

Post ioma ĉirkaŭrigardo mi, nefilozofo, dirus, ke la rilato inter vorto kaj nocio ne estas konflikta. Nia reala ĉiutago ne krias pri streĉo inter ili. Ekzemple en terminologio, tie nocio ja estas peranto inter vorto kiel nomo kaj objekto indikata per la nomo.

**Nocio kaj vorto kiel termino kaj netermino**

Nocioj akompanas sciencojn, sciencajn komunikojn, kaj vortoj

beletron kaj poezion, do artistajn komunikojn. En la polusigo de la nocio-vorta problemo proponas sin kompareblo de ambaŭ helpe de "lingvo de scienco" kaj "lingvo de beletro kaj poezio". Ilia komuna karakterizaĵo estas, ke ambaŭ uzas leksikajn unuojn kaj bezonas sintakson.

Scienco sin direktas per la principo, ke ĉiu ĝia vorto kaj frazo havas unu logikan signifon. En scienco la lingvo servas nur por difini tion, kion sciencistoj eltrovis, por formuli iliajn pensojn. La sola funkcio de vortoj en scienca teksto estas krei asertojn, kiuj per si mem ne estas celo, sed nur rimedo por verifiko en estontaj eksperimentoj pri koncerna teorio. Por sciencisto estas do vortoj nura helpilo. Krom vortoj komunuzaj sciencisto uzas ankaŭ vortojn fakajn, kiuj estas nomoj de objektoj, procesoj kaj kvalitoj. Ili estas nomataj terminoj. La terminoj estas lingvaj signoj de nocioj. Nocio de termino egalas al signifo de termino. Tiu aserto estas ebla, ĉar la nocio en scienco estas precize difinita. Terminoj kiel faka nomo ne estas vorto, kiu "prenis sur sin la riskon de vivanto...", kiel diris la filozofo. Terminoj estas vorto nur el gramatika vidpunkto, sed semantike ĝi havas ĝeneraligan karakteron, estas uzebla por kiu ajn objekto de sia klaso, kiu en ties nocio reflektiĝas.

Beleto kaj poezio uzas vortojn alimaniere ol la scienco. En la beleto kaj poezio oni allasas sekundarajn faktorojn lige al teksto. Precipe la poezio, en kiu ankaŭ aperas klaraj kaj konkretaj ideoj, klopodas, ke da eblaj signifoj kaj interefikoj inter la vortoj estu pleje, ne nur por konservi internan liberecon de poemo, sed ankaŭ en la intereso

de pli granda komunikeblo kaj libero de la legantoj mem. La tasko de vortoj en poemo estas elvoki en la leganto analogion aŭ paralelan ludon de sentoj, pensoj kaj interesoj, enkonduki lin almenaŭ por momento en la saman aŭ proksiman internan situacion, gvidantan al lia persona respondo. La poezio intence ebligas pli da komprenoj, ne sole unu, kiel en scienca teksto. Verŝajne tio respegulas la mondan realon pli bone, ĉar hazardo kaj necerteco apartenas al la bazaj principoj de la realo. Unu funkcio de vortoj en poemo do estas kreo de t.n. pseŭdoasertoj, kies vereco estas akceptebla kaj verifebla nur el certa vidpunkto, laŭ etoso de la poemo.

Rubato en la scienca lingvo estas nepre nedezirata, sed male en artisma teksto estas dezirinde programece disvolvi interkomprenon helpe de alia dimensio ol estas komuniko per ekzakte difinitaj nocioj-terminoj. La origine muzika termino rubato - tempo rubato - estas metafore ŝovita al krea kaj akcepta povo de homa individuo en kiu ajn komunikado, ne nur muzika. La vortoj tie ne estu terminoj, la vortoj spegulu la naturon en ĝia bunta variado kaj permesu krei ne nur al la aŭtoroj, sed "krei" ankaŭ al la legantoj laŭ ilia subjektiva povo emociiĝi, partopreni la enhavon laŭ siaj propraj kondiĉoj.

En la maniero de uzado de vortoj la scienco kaj poezio moviĝas en malsamaj, preskaŭ reciproke inversaj direktoj. Sed malgraŭ tio, la metaforaj celoj de ambaŭ ne estas kontraŭaj. La scienca komuniko celas transdoni al leganto kaj al anonima scienca datumbazo unusencan informon pri unu projekcio de unu reala fenomeno. La poezia komuniko celas elvoki en leganto kaj en ĝenerala kultura subkonscio de iu homa komunumo similajn sentojn kaj similan komprenon de certa aspekto de la homa ekzisto.

Arto estas arto ritmi kun la naturo, simbiozi eksterracie. Pravus do tiu, kiu konsideras homan spontan bezonon identigi sian internan kreon stimulado kun la ritmo de naturo. En ĝi estas radikoj kaj mem la esenco de nia kulturo. Sed ni tenu nian atenton ĉe la komunika plano, ĉu la lingvo de scienco unuflanke kaj la lingvo de arto aliflanke estas eventoj paralelaj, ĉu procedoj diverĝaj. Por veni al certa starpunkto indas observi la leksikan ebenon, nome la aferon de terminoj kaj neterminoj.

Termino kaj netermino ne estas strikte apartigitaj nocioj, sed nocioj karakterizitaj per reciproke interefiko kaj interpenetro. Leksiko de lingvo estas unu el pluraj ebenoj de lingva sistemo - la leksika ebena. La faka leksiko kiel tuto estas parto, sub-sistemo de tiu ĉi leksika ebena. La faka leksiko estas kolekto de rekonataj, plejparte normigitaj terminoj de ĉiuj fakoj. La nefaka leksiko estas komprenata kiel ĝenerala literatura leksiko aŭ simple ĝenerala, iam nomata ankaŭ komuna, konunuza leksiko aŭ vortprovizo.

El ĉiuj lingvaj ebenaĵoj la leksika ebena havas la plej proksiman ligon al la eksterlingvaj realaj okazaĵoj. Estas do eble sekvi la evoluon de la faka leksiko konekse kun la scienca, esplora, produkta k.a. agadoj, konekse kun la ŝanĝoj en la socia evoluo kaj teknika progreso.

Faka teksto estas komunika akto, kies ambaŭ partoprenantoj - aŭtoro kaj adresato - estas fakuloj. La teksto estas kompilata surbaze de anticipe akiritaj scioj pri terminoj-nocioj kaj ne estas necese ĉiun terminon ekspliki. La ekspliko de termino okazas nur en specialaj kazoj, ekzemple ĉe la emfazo de certa nova, diferenca, komplementa konsidero de termino, aŭ se temas pri speciale grava nocio. En la faka teksto tiukaze okazas eks-

pliko:

- pere de superordigita nocio, t.n. proksima genro,
- helpe de sinonimo, esprimanta la saman enhavon,
- helpe de antonimo,
- helpe de komparo aŭ analogio,
- per paralela ekspliko, t.e. ripeto de certaj esprimoj por akcenti sistemecon kaj por subteni kontinuecon,
- per diferencigo, helpe de la verboj "diferenci", "distingiĝi" aŭ la prepozicia esprimo "diference de",
- per subordigita propozicio, plej ofte per rilata propozicio,
- per negativa limigo,
- helpe de dispartigo de la termino-nocio, helpe de elnombro de ties pliaj karakterizajoj, enmeto de ekzemplo, mencio de cirkonstancoj.

Populariga teksto kiel populara scienca literatura verko traktas fakan temon per simpligita formo, iam ĝi uzas elementojn de parola lingvo kun ioma forviŝo de termina karaktero. La uzitaj terminoj estas eksplikitaj. En la popularigan tekston plie penetras subjektivaj elementoj, kies tasko estas ligi kontakton kun la leganto-nefakulo.

Tute alia tipo estas la teksto artisma, ĉe kiu krom la komunika funkcio ludas gravan rolon la funkcio estetika. Terminoj en ĝi kutime ne estas. Se tamen estas, ili servas unue laŭ sia origina tasko, due en derivitaj signifoj kiel fonto de novaj imagoj kaj bildoj de asocieca imagivo, kiel jam estas menciite antaŭe.

## Terminigo

Terminigo estas proceso, en kiu nefaka vorto ricevas fakan signifon, en kiu vorto de komuna leksiko fariĝas sistema termino. En la proceso de terminigo vorto de komuna leksiko specialiĝas, amplekso de ĝia signifo malvastiĝas, la elementoj de ĝia signifo

modifiĝas kaj stabiliĝas. Ekzistas kvar tipoj de terminigo, ili identas kun la metodoj de kreo de terminoj:

- morfologia kreado, derivado,
- sintaksa kreado, permanentaj vortgrupoj,
- semantika kreado, precizigado, metafora kaj metonimia transportadoj,
- elpruntado el aliaj lingvoj.

La terminigo en la nuna stato de evoluo de terminaroj kaj nomenklaturetoj en Esperanto, kompare kun la etnaj lingvoj, estas konsiderinde specifa. En la lingvoj de industrie alte evoluintaj nacioj estas la terminaroj kaj nomenklaturetoj jam establitaĵoj, dum en Esperanto estis tiudirekte faritaj nur kelkaj privataj paŝoj.

Ekde la aŭtoro Zamenhof ĝis hodiaŭ estis proponataj kaj enkondukataj fakaj nomoj spontane kaj ofte ili ne plenumas la bazajn principojn de termino, nur escepte ili apartenas al koheraj termin-sistemoj. Tiuj ĉi "terminoj" estas pli komunlingvaj fakaj nomoj ol terminoj kaj estas necese prikonsideri ilin en kvalifika termina proceso. En tiu konscie farata evoluigo oni ne forgesu, ke eksterordinare specialaj terminoj, precipe la nomenklaturaj nomoj, ekzemple de vegetaĵoj, animaloj, kemiaj kombinaĵoj, meritaj apartajn normojn en la ĉiutaga parola lingvo kaj finfine ankaŭ en la nefaka literatura lingvo. Tiun ĉi dualecon oni ne vidu kiel balaston, sed kiel naturan aferon. Estus eraro opinii, ke la nomojn de bestoj kaj plantoj oni povas ĉerpi nur el la latinforamaj biologiaj nomenklaturetoj, kiuj estas jam internaciaj. La sciencaj nomoj ofte konsistas el du vortoj: substantivo indikanta la genron, al kiu la subjekto apartenas, kaj epiteito indikanta la specon, specion, interne de la genro, sed la ĉiutaga lingvo ofte distingiĝas, precipe organismojn, laŭ aliaj kri-

terioj ol scienco. Pro koncizo oni en parola lingvo emas forlasi la specian epiteton kaj uzi nur la gentan nomon, kiu fakte havas alian signifon, pli vastan signifon. Tian eraron siatempe montris C. Stop-Bowitz: korvo ekhavis la antikvan latinan signifon de "Corvus", dum tiu vorto en la nomenklaturado indikas la genron, al kiu apartenas ankaŭ korniko, frugilego, monedo k.a.

### Malterminigo

Malterminigo estas inversa proceso al terminigo - preskaŭ ĉiam proceso spontana. La malterminigo prezentas unue iompostio-man perdon de faka signifo de vorto kaj ĝian transiron en neterminan leksikon, due penetron de sciencaj kaj teknikaj terminoj en diversajn sferojn de la vivo.

En la malterminiga proceso termino perdas sian precizan signifon kaj akiras elastan semantikan formeblon, kiu estas karakteriza por la vortoj de ĉiutaga lingvo. La proceso estas plurfaza. Komence kreskas la frekvenco de uzado de iu termino, kion oni povas nomi moda ondo. La termino venas en novajn neterminajn kuntekstojn. En la plua fazo vastiĝas ĝia signifo, ĝi liberiĝas el la termin-sistemo kaj en la komuna leksiko ĝi estas iompostio-man retaksata, ĝia origina signifo, nun malpli preciza, ĝenerala, akiras novan asociigan povon kaj pli vastan kaj varian valencon en teksto. Ekzemploj: Telegrafa stilo estas tre konciza stilo. Stimulo el la ekonomika fako vastiĝas en la publicista medio tute libere, simile bilanco, kapacito, klimato, modelo, sondi kaj multaj aliaj.

La malterminiga tendenco, kiel mi jam diris, estas spontana. Ĝi estas rezulto de altiĝanta ĝenerala klereco de la homaro, rezulto de la vivstilo en la teknike evoluinta mondo, kiam homoj havas

konsiderinde pli da libera tempo por siaj kromprofesiaj intereso.

Laŭ gnoza vidpunkto ni povas konstati, ke ankotaraŭ en ne tre fora pasinteco influadis nian pensadon la metodoj de Kartezio kaj Neŭtona meĥaniko, gvidantaj ĉion al rigida ordo en supera aranĝo de fermitaj sistemoj. La emociiga povo de klaraj rilatoj disiĝis kaj la lokon okupis koncilio pri la sistemo, kiu pozicias distanco de iu ekvilibro, kiu estas dinamika marŝo, senfina vario inter totala kaoso kaj senŝanĝa ordo, Jin kaj Jang.

Ankaŭ nian etan problemon de nociosistemoj, de terminoj kaj neterminoj, ni devas observi sen-skrupule, kiel ĉiun malfermitan sistemon. La malterminigo estas proceso natura.

### Konkludoj

Estas konate, ke sistemo de nocioj estas grupo de nocioj ligitaj inter si per logikaj kaj ontologiaj rilatoj. Estus oportune vidi la sistemon kiel statikan fosilion. La natura mondo kaj la universo ne estas statikaj objektoj, sed dinamikaj procesoj, apertaj sistemoj, en kiuj grave rolas plej diversaj faktoroj, ankaŭ la neekzaktaj.

La historio kaj sociologio instruas nin, ke rigidaj strukturoj de totalismaj reĝimoj, kun kia ajn ideologio, malhelpas socian evoluon. La samo validas pri nociosistemoj kaj finfine ankaŭ pri lingvosistemoj. Ankaŭ ili devas esti apertaj kaj reflekti ĝeneralan evoluon de ĉio ĉirkaŭe, sen perforto kiel krea faktoro.

La raciecon de nociosistemoj ni vidu en ties praktika uzoblo en la faka komunikado. La rolo de la sistemoj estas evidenta, se ni komprenas ilin kiel helpajn rimedon sur la vojo de ekkonado al vera simbiozo kun la naturo kaj eterne. Ni vivas en aperta vaj

sistemo, kie gravas adapteblo, interŝanĝo kaj prilaboro de informoj, lernado kaj vola decido. Rigida sistemo gvidus al revolucio, kies detrua forto respondus al malracionaleco de venkita reĝimo. Rigida nocio sistemo gvidus al interferencoj en kontakto kun socia kaj teknika evoluo, akompanata per daŭra disharmonio.

En la mondo okazajojn influas pli la malracionala pensado ol raciaj faktoroj, atestus tion ĉiutagaĵ spertoj ĉirkaŭ ni kaj ankaŭ en nia propra vivo, kompreneble la influoj ne ĉiam estas pozitivaj. En la vico de pensoj pri la rilatoj inter nocio kaj vorto, termino kaj netermino, restas eldiri admonon. Ni ne serĉu konflikton inter ili. Nocio kiel helpa abstrakto ne estas "vorto kun formortinta korpo, moviĝanta nur sur la protezoj de difinoj". Nocio apartenas al la faka lingvo-tavolo kaj ne estas rivalo de vorto. La vorto apartenas al ni ĉiuj, ĉar ni ĉiuj vivas kiel individuoj kaj niaj paroloj respegulas nian animon rubate koloritan.

Pensoj de la filozofo cititaj enkonduke estas pravaj, sed ili ne veku riproĉojn. Kiel profesiuloj ni bezonas komunikiĝi kun samprofesiuloj nocie perfekte. Sed kiel homoj ni rajtas la vortojn komplementi per gajmieno kaj okulbrilo, aliam per kuntiritaj brovoj kaj sufokita voĉo formi ilin pikile. Por impresi eĉ la voĉo kaj vizaĝo ne estas necesaj, la elekto de vortoj, onomatopeo kaj frazakeno vorton alivestas. Estas feliĉo, ke ni ne estas robotoj, sed individuoj. La vortojn ni povas vesti laŭ la cirkonstancoj.

Marto 1992

*La eseo gajnis la premion "Luigi Minnaja" en la belartaj konkursoj de UEA por la jaro 1992.*

### *Speciala aldono por Starto:*

*Nocio estas ĝeneraligita bildo de tiuj karakterizaĵoj de objekto, kiuj estas por la homa ekkono esencaj. Vi povus ĝuste aserti, ke nocio estas signifo de vorto. Ĉiu nocio havas sian enhavon kaj amplekson, sian "semantikan kampon". Unuflanke ekzistas subjektoj klare distingeblaj (ekz. la urbo Prago, la urbo Brno), aliflanke aliaj subjektoj ne estas klare apartigitaj (grandurbo, urbejo, urbo, urbeto, setlejo, komunumo, vilaĝo, vilaĝeto, domaro, kolonio).*

*Ankoraŭ pli evidenta estas la semantika kampo de koloroj: dum la eŭropaj lingvoj uzas 4 - 6 nomojn por la bazaj koloroj, en iuj lingvoj de Afriko nur 2 aŭ 3 (ekz. ruĝa-flava, verda-blua). En la segmentado de kolora semantika kampo naciaj lingvoj ne estas interakordaj. Diference segmentata kampo ne estas io eksterordinara. Ni observu la anglan verbon "go", kiu en la ĉeĥa signifas aŭ "jiti" aŭ "jeti". La ĉeĥa "jet" en Esperanto povas signifi ĉu "veturi", ĉu "rajdi" simile kiel en la germana "fahren, reiten". En iuj nordamerikaj indiĝenaj lingvoj oni krome trovas specialajn nomojn pro "rajdi malrapide", "rajdi galope", "iri sur kvar", "iri procesie".*

*Ni sekvu la neceson diference segmenti nocian semantikan kampon helpe de frazeologiaj ekzemploj en la ĉeĥa lingvo kaj en Esperanto. La ĉeĥa verbo "sejít":*

*- Turista při svém putování sešel z cesty. La turisto dum sia vago devojiĝis. Tato idea mně nikdy nesejde z mysli. Tiu ideo neniam malaperos el mia menso. Během své nemoci jsem poněkud sešel. Dum mia malsano mi iome malgrasiĝis. Každý diktátor vždy sešel a v budoucnu také zajde. Ĉiu diktatoro ĉiam pereis kaj estonte ankaŭ pereos. Opilec schází pomalu. Drinkulo kadukiĝas malrapide. Schůze se nesešla. La kunveno ne*



okazis. Výletníci sešli horu. Ekskursantoj descendis monton. Letos sniž sešel brzy. Nunjare la neĝo degelis rapide. Mne na tom vùbec nesejde. Por mi tio tute ne gravas. Sešli se po mnoha letech. Ili renkontiĝis post multaj jaroj. Sešli jsme se v názorech. Niaj opinioj akordiĝis,

Nun estas via tasko orientiĝi en Esperanta semantika kampo kaj ne laŭvorte, sed laŭnacie trovi en semantika kampo de la ĉeĥa lingvo adekvatan tradukon por diversaj parolturnoj trovitaj en Esperanta literaturo:

- vojaĝi okulmalferme - dorso-  
sterni - sangsubflujaj okuloj,  
sangoŝvelaj okuloj - profunde  
enkavaj okuloj - piedaĉi, plandi  
- diskarni ŝafon - disungi, dis-  
grati - forungi rabaĵon - elakom-  
pani - mirlongaj vizaĝoj - marŝ-  
laca - reve okuli, okuleti, oku-  
legi - endi - elkubuti vojon -  
hejmsidulo - svingsalti - ujigi  
manplatojn - ekklaki la manojn  
- eĉ scieron mi ne havas - ĉio  
vulkanis en li - trajtiĝi en la  
vizaĝo - post-vost-kuranto -  
produktad-rimedoĵ - mensa kaj  
fizika laboroj - sinvendema -  
komedii - ie-tie, sporade, dise  
- prisilenti, pridiskreti - ler-  
najo - fingrodisa mano - moŝti  
- pojnhorloĝo, brakhorloĝo - aĉis  
koto en la strato - enmodigi -  
dispordi - vestiblo pordanta en  
la ĝardenon - misŝanculo - vual-  
voĉe - lavotaĵo, tolaĵo - sak-  
strato - mane duoncirkli - manojn  
dorsoposte - diskurre - disbraki  
- mi ŝapumos al vi la okulojn  
- remburi la prezojn - aletendita  
mano - subbraki - kato sunĝuis  
sur la korto - flugilantaj anse-  
roj - ne okullasu ĝin - flam-  
okuloj - iri tra super kadavroj  
fiŝvinga - endiri - li entrikas  
ĉi-bildon - la muziko sovaĝas  
- fordiboĉitaj vangoj - enen -  
milmil sagoj - trasabri/traglavi  
al si vojon - estra voĉo - la voĉo  
glaciis - la regiono blankis.  
Brno, decembro 1993

## 70 JAROJ DE E-KLUBO EN PŘEROV

La klubo estis fondita la 28-an de februaro 1923, estro fariĝis Adolf Malík, vicprezidantino s-anino Grauerová, sekretario s-ano Zatloukal, pluaj komitatanoj prof. Pittner, s-anoj Pokorný, Štimpl kaj s-aninoj Hrabálková kaj Chmelařová. La fondon antaŭis kurso kun 62 kursanoj kaj sekvis ekspozicio por la publiko. Inter la E-instruantoj figuras ankaŭ lernejestro Josef Krumpholz, kiu havas buston pro siaj meritoj en la lernejo "Za mlýnem" (Malantaŭ la muelejo).

Post la dua mondmilito la klubanoj kunvenadis sub tegmento de la Kleriga Centro en la ekonomia lernejo kaj ekde 1947 en fervojista klubo de la stacidomo.

Kvankam en 1953 estis la tutŝtata E-asocio malpermesita, la kluboj laboris plu kaj en Přerov eĉ okazis konferenco de esperantistoj kun teatraĵo "Ondro kaj drako" de Viktor Dyk tradukita de Josef Vondroušek.

En 1956 la klubo transiris en la uzinan kulturklubon de la bierfabriko kaj samtempe fondiĝis nova klubo en la maŝinfabriko.

En 1958 esperantistoj el Přerov tradukis la plej gravan parton de Pacmanifesto, dissendis 800 ekzemplerojn al 65 landoj, kaj samtempe kolektis centojn da subskriboj por la paca alvoko de Albert Schweitzer. En oktobro 1960 esperantistoj aranĝis ekspozicion de desegnaĵoj de japanaj infanoj.

Esperantistoj tradukis prospektojn de la maŝinfabriko, ceramikfarejo kaj pri Lidice, okaze de la 300-jara datreveno de morto de J.A. Komenio publikajon "Komenio eterne viva" kaj paroligis la filmon "En signo de Neptuno".

En pluraj jaroj sekvis normala klubo vivo - kursoj, ekspozicioj, partopreno en E-aranĝoj. Tutasocian famecon kaj gravecon akiris s-anino Jiřina Vondráková, longjara membrino de la Centra Komii-

tato de ĈEA, Ludvík Chytil aŭ ekzemple fervojisto Jindřich Tomášek.

Trimonata ekspozicio estis aranĝita okaze de la 100-jara datreveno de ekesto de Esperanto en 1987. En 1991 la klubo transiris al Meza faklernejo en Šířava, ekde 1992 la klubanoj kunvenas en la stacidoma klubejo. La klubula biblioteko posedas 300 librojn.

#### SOLENA KUNVENO EN PŘEROV 1993

Sabate la 23an de oktobro jam de mateno estis en salono de loka domo de fervojistoj vigle kiel en abelujo. Por festi la gravan datrevenon de esperantistoj en Přerov alvenis kaj alveturis 70 ĉeestantoj, inter ili 17 gastoj el

Pollando kaj Germanio. Solena kunveno, kiun gvidis prezidanto de la klubo, kulminis per programo de pola grupo "Kabaredo amuzo" el Glivice. La ĉeestantoj gratulis per salutparoloj kaj s-ano Sládeček el Ostrava per kanto. Dume ni admiris interesan ekspozicion de dokumentoj kaj fotografajoj el klubula historio. La feston vizitis redaktoro de loka ĵurnalo kaj en kelkaj periodaĵoj poste aperis artikoletoj pri ĝi. Vesperon la plejparto de ĉeestantoj finis per dancado en restoracio. Dimanĉe multaj vizitis Muzeon de J.A.Komenský. La klubo ricevis 64 salutleterojn, inter ili de urbestro de Přerov. La feston salutis ankaŭ esperantista redakcio de Radio Varsovio.

#### Komuna foto el solena inaŭguro:



## HONORAJ MEMBROJ DE ĈEA

**Inĝ. Karel Janouš** naskiĝis la 4-an de februaro 1916 en Cekanice, distr. Tábor. Profesie oficisto, malpli poste konstrua inĝenieroo, nun emerito.

Li esperantistiĝis en la j. 1936 kaj membriĝis en Esperanto-klubo en Ostrava kaj samtempe en Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovakio. Post la dua mondmilito li tuj en la jaro 1945 komencis agadi en la movado. Li komencis eldonadi en Ostrava Informilon kaj instigis renovigon de renkontiĝoj de ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj sur la monto Čantoryja en Beskidoj, kiu daŭras ĝis nun. Li plenumis diversajn funkciojn en Esperanto-klubo en Ostrava, eldonigis lokajn cirkulerojn kaj bultenojn, instruis la lingvon en diversaj kursoj en Ostrava-regiono kaj ankaŭ en Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. En la jaro 1981 li fondis kaj prezidis la regionan Esperanto-komitaton en Nordmoravia regiono, kiu estis la plej bona funkcia regiona gvidorgano de ĈEA. En 1982 li elektigis kiel komitatano de ĈEA kaj la funkcion li plenumis ĝis la jaro 1987. Li ankaŭ publikigis en la internacia lingvo, pli vigle en lastaj jaroj. Li multon meritis por vigla Esperanto-movado en Ostrava regiono, kiu estas la plej tiudirekte aktiva en Ĉeĥa respubliko. En la jaro 1987 li estis honorigita per diplomo de ĈEA por siaj meritoj, en la jaro 1992 la Esperanto-klubo Ostrava-Vítkovice elektis lin honora prezidanto.

**Prof.ThDr. Rudolf Horský** naskiĝis la 4-an de decembro 1914 en Vamberk. Post finstudo de teologia fakultato de J. Hus en Praha li laboris kiel pastro de Ĉeĥoslovaka eklezio en diversaj lokoj de Ĉeĥoslovakio, ekde la jaro 1954 li aktivis en la Teologia fakultato en Praha kiel profesoro kaj sekve kiel dekanoo ĝis sia emeri-

tiĝo en la j. 1992.

Li esperantistiĝis jam en sia junaĝo kaj post ekregoo de la lingvo li instruis ĝin en vico da diversaj kursoj, ĉefe en Prago kaj en Someraj E-Tendaroj. Li tre aktive partoprenis la Esperantomovadon plenumante i.a. funkcion de prezidanto de Esperanto-klubo en Prago, de sekciestro de kristana sekcio de ĈEA kaj vicestro de paca sekcio de ĈEA. En la internacia movado li aktivis en la komitato de KELI, partoprenis ĝiajn kongresojn, prelegis pri diversaj eminentuloj ĉefe el la ĉeĥa historio antaŭ esperantista kaj neesperantista publiko enlande kaj eksterlande. Li ankaŭ vaste publikigis en la internacia lingvo, plej ofte en eksterlandaj gazetoj. Li partoprenis ankaŭ diversajn humanecajn helpagadojn, en Ĉeĥoslovakio li organizis Agadon E 3 kaj por Afriko li kolektis kaj forsendis pli ol cent mil okulvitrojn.

Li grave kontribuis al la movado, ĉefe inter kristanoj kaj tial ĈEA atribuas al li honoran membrecon.

- vk -

### **Václav Špŭr**

Tre multaj esperantistoj en nialando kaj ankaŭ eksterlande, partoprenintoj de la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy, konas persone s-anon Václav Špŭr, unu el la ĉefaj aktivistoj de SKED. Li naskiĝis la 13-an de julio 1915 en Arnoštov (distrikto Nová Paka).

Frekventinte Komercean Akademion (Hořice v P.) li laboris 23 jarojn en la financa sfero, el tio sep jarojn kiel direktoro de Ŝtata Ŝparkaso en Poděbrady kaj Doksy, ĉefa ekonomo de Ŝtata Bieno Dubá kaj ĝis 1980 vicdirektoro de Distrikta Terkultura Administracio (Č. Lípá). Li aktivis en kelkaj sportbranĉoj, ankaŭ kiel trejnisto en teniso. Nuntempe li gvidas kursojn de la angla kaj germana lingvoj kaj servas al

filatelistoj kiel tradukanto. En 1946 li kun Karel Šolc, Ĉeinstruisto, fondis Someran Lernejon de Esperanto en Doksy, kun 4 ĝis 5 gradoj. Post kelkaj jaroj la titolo "Lernejo" estis laŭdeve forlasita kaj anstataŭe akceptita "Kolegio". SKED estis vere altnivela kursaro (dusemajna), kun bonaj instruistoj, sub direktorado de d-ro A. Pitlík. Ankaŭ la eksterkursa aktivado, societa vivo, baloj, eĉ "venecia nokto" sur la Mácha-Lago kreis tre ŝatatan etoson. La poeto Karlo Pič, daŭra partoprenanto, aprezis tiun medion per letero el UK en Portlando (1972) al J. Vítek, laŭ kiu ĉiun Esperantan aranĝon superis la nivelo de la Kolegio en Doksy. Kaj al tio ankaŭ Špŭr kontribuis. - Krom Doksy Špŭr kunorganizis SKE en Slovakio: 1950 en Svit, 1952 Poprad. Li iniciatis prezenti en Doksy la dramon de J. Vrchlický "Noc na Karlštejně" (Nokto en Karlův Týn) fare de teatra Societo K.H.Mácha en kadre de ĝia festivalo. Pro sia laboremo kaj kompetento Václav Špŭr fariĝis membro de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (ĈSEK, 1959-1968), poste komitatano de ĈEA, prezidanto de ĝia kontrolo kaj revizia komisiono, membro de la ekzamena komisiono, kaj gvidis, sub komisiono de ĈEA, korespondajn kursojn de Esperanto en ses lokoj. Pro la meritoj la asocio akceptis lin inter siajn honorajn membrojn. Multaj SKED-anoj ŝate rememoras la belajn stud-libertempojn en Doksy kaj ankaŭ ilian laboranton ĉiam ridetantan, Václav Špŭr.

(jm)

## NI kaj UK

En kelkaj lastaj jaroj oni alkutimiĝis, ke partopreno de ĈEA en la Universalaj Kongresoj ne estas neglektebla. Inter kongresanoj ĉiam estas kelkdekaj, sed ankaŭ kelkcentaj grupoj da ĉeĥaj esperantistoj (ĉijare en Valencio pli

ol 25), en la komitato de UEA regule kunsidas niaj reprezentantoj kaj en la komitataj diskutoj estas ofte traktata kaj atentata agado de nia asocio. Ĉijare estis multfoje citita nia 1-a komuna kongreso en K.Vary, kies enhavo kaj rezultoj estis okulfrapa ekzemplo de sukcesa dulanda kunlaboro. Membroj de la asocio ankaŭ aktive kontribuas al programo de multnombraj fakaj kaj publikaj dumkongresaj kunvenoj. Sed ĉeĥaj esperantistoj altigis prestiĝon de nialanda movado pere de valoraj kontribuoj in Internaciaj Kongresaj Universitatoj kaj ankaŭ per allogaj programeroj en kultura parto de Universalaj Kongresoj. Ankaŭ malantaŭ kongresaj ĝiĉetoj ni jam trovis niajn membrojn, kiuj helpis al organizintoj de la kongresoj.

La menciitaj faktoj montras, ke Ĉeĥa Esperanto-Asocio estas vere serioza membro de UEA kaj la Esperanto-movado en Ĉeĥa Respubliko firme ligiĝas al la movado tutmonda. Malgraŭ tio mi diru, ke daŭre mankas al ni la kulmina pruvo de nia kontinueco kun la esperantista tutmondo - mi pensas la efektivigon de Universalaj Kongresoj. La antaŭmilita ĉeĥoslovaka esperantistaro tiun pruvon realiĝis jam en la jaro 1921 - nur tri jarojn post naskiĝo de la nova ŝtato - sed en la renovigita postmilita Ĉeĥoslovakio tiu okazo ankoraŭ ne estis. Ne pro manko de intereso el nia flanko - ja oni jam dufoje intencis inviti UKon en Pragon - sed ĉu pro kialoj politikaj aŭ pro timo el enlanda ekonomia malstabileco flanke de kompetentuloj - la intencoj ne realiĝis.

Nun ni denove staras antaŭ la sama problemo. La komitato de ĈEA validigis sian inviton kaj el proksimaj jaroj restas por UK ankoraŭ libera la 1996-a. Estis faritaj unuaj modestaj paŝoj kaj oni nun esploras opiniojn de respektivaj kunlaborantoj, kunorganizantoj, protektantoj. La res-

pondoj ne estas ankoraŭ sur mia tablo, tamen mi forte kredas, ke tiudirekte ni agas en plena konsento de nia tuta membraro. Sed senkonsidere al la fina rezulto ni ekzamenas niajn organizajn fortojn per realigado de diversaj internaciaj renkontoj - ĉu tio estis la IFEF-kongreso en Olomouc en 1991, ĉu la oficiala antaŭkongreso de UK en Praha pasintjare aŭ ĉi-jara komuna kongreso de ĈEA-GEA en K.Vary, la venontjara 67-a kongreso de SAT en Strážnice kaj planataj esperantistaj kongresoj en plujaj jaroj. Ĉiuj ĉi renkontoj meritas la plej altan subtenon de niaj membroj kaj mi varme rekomendas partoprenon en ili, eĉ kiel nemembro de koncerna Esperanto-komunumo. Abunda ĉeĥa partoprenantaro dokumentas, ke ni sopiras pri UK en Prago kaj volas kaj ankaŭ kapablas ĝin okazigi.

V. Kočvara

### KONVERSACIAJ RONDOJ

Por pli bone lerni la lingvon, por trovi okazojn paroli en Esperanto, Pedagogia Sekcio de ĈEA volus komence de lernojaro 1994 - 1995 krei konversaciajn rondojn.

#### Kio estas Rondo?

Laŭ bazo de Freinet-pedagogio, libera esprimado estas unu el ĉefaj principoj. Tio valoras ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenkreskuloj.

En Francio ni trovis ekzemplon por ni. Tie jam de pluraj jaroj cirkulas inter volontuloj, kiuj deziras perfektigi, eĉ du diversaj specoj de rondoj.

La partoprenantoj povas ĉu skribi kaj legi, kiam ili apartenas al skriba rondo, ĉu aŭskulti kaj paroli, kiam ili apartenas al registrita rondo.

Ĉiu rondo havas respondecul(-in)on. Li aŭ ŝi skribas aŭ registras, laŭ memvola temo, kaj sendas la verkon al la 2-a, kiu

siavice, legas kaj skribas, aŭ aŭskultas kaj registras. Post tio la dua sendas la tuton al la 3-a, kiu same faras, k.t.p.

Post mallonga tempo la rondo faras sian tutan rondiron kaj revenas. La ludo donas motivadon.

Ni elektis por vi la konversaciajn rondojn. Ili estas libervola servo de Pedagogia Sekcio de ĈEA. Por partopreni la rondon estas necesa nura kondiĉo: ekaboni la Internacian Pedagogian Revuon (100 Kč).

Ĉiuj, kiuj deziras partopreni, povas sin turni al Mgr. Vlasta Janáková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov, ĉis 30.5.1994.

Mi esperas, ke al vi plaĉos la ideo kaj ke inter vi la kasedoj bone cirkulos kaj kunportos al vi novaĵojn, interesajn interŝanĝojn kaj progresojn en la lingvo. Bonan ŝancon al ĉiuj.

Mgr. Vlasta Janáková

Jam la 3-an jaron oni instruas en Pedagogia Fakultato en Hradec Králové Esperanton. La kurso estas ĉefe destinita por instruistoj de la supera lernejo. En du grupoj kuras la instruado samtempe por komencantoj (5), por progresintoj (6).



#### KORESPONDI DEZIRAS

Blinda 43jara kroato deziras korespondi kun samaĝul(in)oj pri diversaj temoj. Adreso: s-ro Ivo Tus, J.Trdini 6a, 51000 Rijeka, KROATIO

16-j italo volus korespondi kun geamikoj pri Esperanto kaj poŝtmarkoj - li certe respondos: BERGONI PAOLO, VIA GARIBALDI, No 13/15, 20070 BORGIO - S.GIOVANNI (Mi) ITALIA

Pavla Zemanová, U starého mlýna 18, 104 00 Praha 10 - Uhřetěves ĈEĤA RESPUBLIKO

\* \* \* \* \*

**ASISTI /Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj/ invitas al internacia**

**INTERRELIGIA SEMINARIO  
ESPERANTISTA PASKO 1994**

31.3.-4.4. en

la urbo Tabor /Ĉeĥio/ kun la temo  
**"NENIU ESTONTO SEN INTERRELIGIA  
PACO:**

- akcepti diferencojn
- venki barojn
- serĉi komunon"

La aranĝo estas celata por adeptoj de plej diversaj religioj kaj spiritaj instruoj, kiuj same sentas sinceran deziron transpaŝi siajn limojn, por komune pli profundigi en ekkono kaj kompreno de la Vero kaj serĉi la vojon al travivaĵo de esenca reunuiĝo kun la Universo kaj kun ties Kreinto, por povi ame disradii tiun ĉi Lumon de Ĝojo al tiuj, kiuj suferas vivante en tenebro ..

**SUPOZATA PROGRAMO:**

\* 31.3. interkona vespero

\* 1.4. matene: prelego + diskutemo I: *"Ĉu teologie pravigeblas supereco de unu religio super alia?"*

posttagmeze: trarigardo de la urbo

vespere: *"La Zamenhofa konceptaro pri interreligiismo"*

\* 2.4. matene: prelego + diskutemo II *"Religie fundamentita vizio pri la homara estonto"*

posttagmeze: laborgrupoj laŭ la temoj I+II

vespere: *"Kiel interreligie mediti, devoti, preĝi?"*

\* 3.4. matene: laborgrupaj rezultoj - konkludoj, fakultative partopreno en la solena meso

posttagmeze: busekskurso al la kastelo Orlik

vespere: arta-medita vespero

La aranĝo okazos en studenthejmo, troviĝanta en trankvila medio, rekte en la urbocentro. Loĝigo estas certigita en 2-3-

litaj ĉambroj /kun komunaj duŝejoj + necesejoj surkoridore/.

Pli luksa loĝado mendeblas kontraŭ krompago en proksima tristela hotelo **Palcat**.

**Kotiztabelo:**

/sumoj en germanaj markoj/

kateg.	aliĝo antaŭ		
	1.12.	28.2.	poste
A	160	180	200
B	65	70	75
C	40	45	50

- B - Pollando, Hungario, Ĉeĥio, Slovakio, Slovenio kaj Kroatio
- C - aliaj ekssocialismaj landoj, landoj de Afriko, Latina Ameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko)
- A - ĉiuj ceteraj landoj

La kotizo inkluzivas: 4 tranoktojn, manĝadon 3 foje tage, fakan programon, ekskursojn, organizajn elspezojn kaj informmaterialojn. Male ĝi NE inkluzivas asekuron. Aliĝilo de A-landanoj validas nur kun almetita konfirmilo pri la pago. B- kaj C-landanoj povas pagi surloke. En markoj aŭ ĉeĥaj kronoj laŭ la aktuala kurzo. La aliĝilon petu ĉe: Bernhard WESTERHOFF, p.k. 500133, D-60391 Frankfurt, GERMANIO, tel. +49-69-519845.

**SPECIALA PROPONO:**

Membroj de ĈEA, rajtas aliĝi por mallongigita tempo - ekde vendreda vespero ĝis dimanĉa tagmezo - kontraŭ speciale rabatita kotizo: NURAJ 390,- Kč kovrantaj 2 tranoktojn, 6 manĝojn, programon ktp. La sumo validas por aliĝontoj ĝis 31.1.1994! Inter 1.2. kaj 15.3.94 kun krompago de 60,- Kč. Ev. postaj aliĝoj estas sen-garantiaj! La aliĝojn sendu al: Vladimír kaj Pavla DVORÁKOVI, Ostravská 637, 199 00 PRAHA 9 tel./fakso +42-2-899602.

P . F . 1994

Plné nebe ptáků  
A přece je stále místo  
pro další  
a další pokolení

Plné vody ryb  
Vlny se sotva vzdují

Země plná lidí  
Zákeřných a lstivých  
Domýšlivých  
A na co?

Mravenci na asfaltovém chodníku  
lehkovážně pobíhají  
mezi podrážkami

A co my?

Mravenci vesmíru  
mezi šlépějemi času

Da birdoj plenas ĉielo  
kaj tamen ĉiam estas loko  
por pluaj  
generacioj

Da fiŝoj plenas akvoj  
Ondoj peze sin levas

Tero plena de homoj  
Insidaj kaj ruzaĵ  
Fierantaj  
Pri kio?

Formikoj sur asfalta trotuaro  
sencele kuretadas  
inter plandumoj

Kio ni?

Formikoj de l' kosmo  
inter piedpaŝoj de tempo

Ĉestmír Vidmann

GRAVAJ INFORMOJ EL LA SEKRETARIEJO DE ĈEA

Ekde la 1-a de novembro 1993 nia Asocio havas neniun konstantan dungiton. La funkcio de la estro de la sekretariejo estis nuligita. Tial eventualajn vizitojn en la sekretariejo antaŭe interkonsentu telefone aŭ perletere! Plu ne estas "oficejaj" aŭ "vendejaj" horoj.

Dum la kuranta novembro estos ŝanĝitaj la telefonaj numeroj de nia Asocio en Jilská!

La sekretariejo de ĈEA, anstataŭ la malnova n-ro 22 02 62 havos la novan telefonan numeron 26 26 31.

La vendejo de la bohemia kristalo de ĈEA havos la novan numeron 26 26 28 anstataŭ la malnova 22 00 89.

Konto por ILEI en Ĉeĥio: 604/8

zp

Český esperantský svaz  
110 01 Praha 1, Jilská 10

\* \* \* STARTO \* \* \*

Nepravidelný věstník Českého esperantského svazu. Vychází 6x ročně. Je určen členům svazu. Odpovědný redaktor: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.** Administrátor: Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2.

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.**

Administratoro: Karel Daněk, poŝta kesto 425, 660 25 Brno 2, Ĉeĥoslovakio  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio. Abonprezo: 14 guldenoj.



# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:

č.j. P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991

Podávací pošta:

664 03 Podolí u Brna